

1988 oktobro
81-a jaro
n-ro 994 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Pli pri kongresoj,
sur tri kontinentoj



UNIVERSALA DEKLARACIO
DE HOMAJ RAJTOJ
40 - JARA

Vi trovos,

ke ni plenumas la septembran promeson, eĉ koste de kvar aldonaj paĝoj! Efektive, jen sur paĝoj 168 ĝis 177 la tuto de la Strategia Plano, projekto de kompleta UEA-filozofio. Ĝi atendas vian reagon. La tujajn – ĉu aplaŭdon, dentogrincadon, fruntosulkigon, tablobatadon, proĝojan dancadon, oscedadon, ekĵeton tra la fenestron... – oni tamen submetu prefere al zorga konsidero pri via respondo kaj al ties surpaperigo. Apud la teksto de la Plano, en grandaj nigraj leteroj, devus aperi la averto: **Silento signifas aprobon.**

Fruktodonan malsilenton, do, ĝis la prilibra novembro!

Enhavo

- 161 Kvardek jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj:
Etiko kaj jura bazo de tutmonda komunumo (Ralph Harry)
- 162 Esperantistoj pledas por la rajtoj de minoritatoj en Rumanio
- 163 Kongresoj: Malgranda sed valora paŝo al sennacieco kaj tutmondeco
(Ĵak Le Puil); Regiona kunveno vojmontras per ĉina-japana ĝemelado
(Zhang Changsheng, Takeuti Yosikazu)
- 164 Infana Kongreseto: Ĉi-jare, plimulto kontentas (David kaj Vera Pochanke)
- 165 Intervjuo kun Valentin Seguru: Vojaĝeblecoj ekdonas allogon al la sovetia junulara movado
- 166 44-a Internacia Junulara Kongreso: Inspire kaj aktive en Zagrebo
(Martin Haase)
- 167 Junularo: Helpu realigi viajn iamajn revojn (Claude Rouget)
TEJO-Aferoj
- 168 Strategia Plano: En la duan jarcenton:
Strategia Plano de Universala Esperanto-Asocio
- 178 Honoraj Membroj: Ĉi-jare, tri kongreslandanoj
- 179 Du novuloj en la Centra Oficejo
Lingvo: Kion signifas nomo?... Reagoj al la julia lingvo-rubriko
- 180 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 182 Loke – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 183 Iom da informoj pri kotizoj kaj membriĝoj; Ekspedo de la Jarlibro
1988; Postkongresa noto; Kotiztabelo por 1989
- 184 Oficiala informilo; Anoncetoj

La kovrilo

La ĉefa Esperanta kongres-sezono denove pasis, kaj postlasis ĉi-numere raportojn, fotojn, kaj esperojn pri la estonteco. Fakte, la artikolantoj pri la tri kovrilaj aranĝoj – TEJO en Jugoslavio, SAT en Brazilo, kaj la Kansasa Ligo en Japanio – unuanime antaŭenrigardas en siaj lastaj frazoj. Ja, post cent jaroj la nomo de nia lingvo ne perdis sian validon!... Kaj prave: ankaŭ la diplomatoj en Novjorko, antaŭ kvar jardekoj, estis esperantoj. Pri iliaj universalaj aspiroj temas la apuda paĝo, pri niaj temas la sekvaĵ. Aŭ ĉu efektive pri la sama afero?

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuvrons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriane (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

Etiko kaj jura bazo de tutmonda komunumo

Kiam Unuiĝintaj Nacioj, la 10-an de decembro 1948, akceptis la *Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj*, venis al nia Tero nova espero: la espero, ke la mondo fariĝas vera komunumo.

Antaŭ la Dua Mondmilito la internacia juro agnoskis ĉefe la rajtojn kaj devojn de suverenaj ŝtatoj. Ĉi tiuj havis internaciajn devojn rilate kaptitojn kaj fremdajn enloĝantojn, sed rilate la traktadon de siaj propraj ŝtatanoj ili estis plejparte sen respondeco al la internacia komunumo.

En multaj landoj, ekzemple en Svislando kaj Usono, la rajtoj de ŝtatanoj, post luktado dum jarcentoj, fariĝis bone protektataj de la interna juro. En Anglio la baronoj, per la “Granda Ĉarto” de 1215, la burĝoj, per la Petskribo de Rajtoj de 1628, kaj post 1689 ĉiuj civitanoj, gajnis gravajn liberecojn kaj rajtojn, protektatajn de la kortumoj.

La “*Déclaration des Droits de l’Homme et du Citoyen*” (deklaro de la rajtoj de la homo kaj de la civitano) eldonita de la francaj revoluciuloj en aŭgusto 1789 – kies datrevenon ni solenos en la venonta jaro – celis la difinon de universalaj kaj individuaj rajtoj. Ĝi konsistigis la antaŭparolon de la franca konstitucio de 1791, kaj la francaj armeoj kunportis ĝin al pluraj eŭropaj landoj. Ĝi ankaŭ ege stimulis aspirojn de batalantoj kontraŭ tiraneco en la postaj du jarcentoj. Sed ĝi ne fariĝis parto de la internacia juro. Tamen, ne sen luktado, la sklaveco estis abolita preskaŭ universale, kaj la batalo por egalaj rajtoj de virinoj komenciĝis.

La Kontrakto de la Ligo de Nacioj, post la Unua Mondmilito, proklamis liberecon de konscio kaj religio, sed nur por popoloj de centrafrikaj landoj regotaj sub kuratoreco. La homoj en tiel nomitaj “civilizitaj” landoj devis fidi al siaj propraj registaroj.

Estis la teruraj praktikoj de diversaj diktatorecaj reĝimoj inter la du mondmilitoj – reĝimoj kiuj i.a. persekutis senpekajn praktikantojn de Esperanto, la “danĝera lingvo” – kaj super ĉio la “holokaŭsto” (brulkatastrofo) en kiu la nazioj murdis centmilojn da judoj nur pro ilia raso aŭ religio, kiuj konvinkis la fondantojn de la organizaĵo nomota “Unuiĝintaj Nacioj” ke respekto al la homaj rajtoj estas esenca fundamento de tutmonda socio kaj paco.

Tial la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estas jure deviga por ĉiuj subskribintoj/ratifintoj, t.e. por preskaŭ ĉiu ŝtato, komenciĝas per la deklaro:

“Ni, la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj [t.e. la nacioj kiuj alianse venkis kontraŭ Germanio, Italio kaj Japanio], *rezolutaj* . . . rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, . . . *decidis* kunigi niajn klopodojn por realigi tiujn celojn.”

Inter la celoj, proklamitaj en Artikolo 1-a estas:

“3. Realigi internacian kunlaboradon . . . por stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio . . .”

La Ĉarto ne difinis “homajn rajtojn”. Kelkaj landoj, ekzemple Sud-Afriko kaj ties amikoj, deziris apliki, sur tiu

tereno, la principon (Artikolo 2(7)), ke “nenio en tiu ĉi Ĉarto rajtigas Unuiĝintajn Naciojn interveni en aferojn, kiuj esence apartenas al la interna jurisdikcio de iu ajn ŝtato”. Sed, laŭ Ĉapitro IX (Internacia Ekonomia kaj Socia Kunlaborado) ĉiu Membro sin devontigis en Artikolo 56-a agadi, kune kaj aparte en kunlaboro kun la Organizaĵo, por realigi ties celojn, inkluzive “*universalan respekton kaj observadon* [emfazo mia, R.L.H.] de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

Laŭ Artikolo 68-a la Ekonomia kaj Socia Konsilio tuj starigis komisionon por la antaŭenigo de homaj rajtoj, kies unua tasko estis verki deklaron kiu difinu tiujn rajtojn, prepare al konvencioj – multŝtataj traktatoj – entenantaj jurajn devojn.

Aŭstralio estis ano de tiu komisiono, kaj mi estis membro de la malgranda komitato, kiu preparis la projekton. Ĝia prezidanto estis s-ino Roosevelt, vidvino de la usona prezidento F. D. Roosevelt. Ĝi konsistis el la kvin konstantaj membroj de la Konsilio de Sekureco (la Respubliko de Ĉinio, Francio, la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, la Unuiĝinta Regno de Granda Britio kaj Norda Irlando, kaj la Unuiĝintaj

Ŝtatoj de Ameriko) kaj manpleno de aliaj Membroj, inter ili Libano. La sekretario, el la Sekretariato, estis kanadano: tiel partoprenis René Cassin, kiu konis la historion kaj signifon de la *Déclaration des Droits de l’Homme et du Citoyen*. S-ino Roosevelt kaj ŝiaj konsilantoj insistis pri la usona Deklaracio de Sendependeco kaj Statuto de Rajtoj. Kun mia angla kolego mi laŭdis la britajn konstituciajn dokumentojn. Kaj la rusa spertulo Vinogradov proponis la enmeton de la ekonomiaj kaj sociaj rajtoj, kiujn oni rigardis tre gravaj en Sovetunio.

Tiel la Deklaracio fariĝis universala laŭ enhavo, kaj ĝi estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo preskaŭ unuanime. Nur Bielorusa SSR, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Saŭd-Arabio, Sovetunio, Ukrainia SSR, Sud-Afrika Respubliko kaj Jugoslavio sin detenis de la voĉdono.

Tamen, same kiel ĉiuj rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo, la Deklaracio ne per si mem havis devigan juran efikon. Ĝi ja servis por difini la “homajn rajtojn”, pri kiuj parolis la Ĉarto. Ĝi ankaŭ estis atesto, ke kelkaj rajtoj jam ĝenerale ekzistantaj havas specifan enhavon. D-ro Ivo Lapenna, en sia libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* (Roterdamo, 1952) opiniis, ke “kvankam ĝi estas formale nur rekomendo, tamen laŭ sia enhavo [ĝi] estas deviga”. Por plicertigi la devojn de ŝtatoj kaj la rajtojn de iliaj ŝtatanoj la Ĝenerala Asembleo, post dek ok jaroj de intertraktado, prezentis por subskribo en 1966 du Konvenciojn: (a) pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj; (b) pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj. La Deklaracio estis la bazo de ambaŭ.

La Deklaracio havis alian gravan influon. Multaj ŝtatoj kiuj fariĝis sendependaj post uzo de sia “rajto de mem-

*“La Deklaracio estas
unua paŝo sur la vojo . . .”*

decido", kaj aliaj kies socioj ŝanĝiĝis, akceptis novajn konstituciojn. Multaj el tiuj enhavas ĉapitron de fundamentaj rajtoj kaj devoj de la civitanoj.¹ Eĉ se, en kelkaj kazoj, homaj rajtoj ne estas ĉiam respektataj, plenumo de tiuj deklaroj estas celo al kiuj viktimoj povas aspiri.

Por la Esperanto-movado la Deklaracio havas apartan signifon. La Ĝenerala Asembleo alvokis ĉiujn Ŝtatojn-Membrojn publikigi la tekston de la Deklaracio kaj "fari, ke oni ĝin disvastigu, afiŝigu, legu kaj komentu, ĉefe en lernejoj kaj aliaj institutoj de instruado, sen distingo bazita sur la politika stato de landoj aŭ teritorioj". Traduko, kiun mi faris en 1948 kun helpo de William Solzbacher, aperis en *American Esperanto Magazine*. Reviziita flugfolio estis eldonita de UEA. En 1976 traduko aprobita de UEA estis represita grandnombre fare de la informoficejo de UN en Novjorko. Per tiuj tradukoj dekmiloj povis legi kaj studi la tekston. Esperantistoj tralernis ĝin eble pli bone ol aliaj grupoj. Ili lernis la signifon ankaŭ per afiŝoj eldonitaj de Unesko kun Esperantaj subtitoloj. Ili konas ĝiajn nuancojn ĉar ofte ili komparis la Esperantan tekston kun la originalaj lingvoj aŭ kun traduko en sia gepatra lingvo. Se estus dubo pri la signifo de oficiala teksto (la ses lingvoj de UN estas egale aŭtentaj sed ne ĉiam identaj!), oni povus konsulti la neŭtralan Esperantan version!

Nia movado ankaŭ, kvankam politike neŭtrala, kompreneble bonvenigis la plifortigon de internaciaj normoj kontraŭ lingva diskriminacio. En Ĝenevo, inter 1953 kaj 1956, mi partoprenis en kunvenoj de la Komisiono de UN pri Diskriminacio kaj Minoritatoj. Espereble neniu Ŝtato ripetos la amasan persekutadon de la nazia epoko, sed ie kaj tie oni spertas malhelpon al Esperanto kiel lingvo uzata de grupoj, kiujn la ŝtatinstancoj akuzas de mallojaleco. En tiaj cirkonstancoj la Deklaracio de Homaj Rajtoj povas esti utila.

Ankaŭ, kvankam ne estas la rolo de UEA aŭ de landa asocio subteni eĉ bonegajn sociajn celojn, ekzemple liberecon de religio aŭ la konservadon de la medio, tamen la internacia lingvo povas servi al bonfaraj organizaĵoj, religiaj aŭ politikaj, ekzemple Amnestio Internacia aŭ "Verdpaco" (*Greenpeace*) por peri internaciajn kontaktojn. Tiaj organizaĵoj povas esti certgrade alianculoj, internacie kaj interne de apartaj landoj, dank' al niaj paralelaj intereso.

Fine, kaj laŭ mia opinio plej grave, la Deklaracio estas unua paŝo sur la vojo al mondo kie, parte pro interkulturaj kontaktoj dank' al Esperanto, la homaro akceptos bazan komunan etikon, la esencan bazon de vera tuthoma komunumo. Tio ne signifas monotonan mondon. Tute kontraŭe. Pluvivos vigla multkultura mondo nur se ni havos komunan interkomunikilon. Mi citu la konkludon de Lapenna:

"La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estas esperiga standardo, sub kiu kolektiĝos milionaj amasoj kaj ĉiuj vere intelektaj elitoj, konsiderantaj la homon unue kaj antaŭ ĉio homo."

**Ralph Harry
en Kanbero, Aŭstralio
21-an de septembro, 1988**

¹Vidu ekzemple la Konstitucion de Popola Respubliko Bulgario, Sofio, 1950. Pluraj tiaj statutoj estas aperintaj en Esperanto.

Kune kun tiu ĉi numero de Esperanto dissendiĝas broŝureto de Amnestio Internacia, kiu enhavas i.a. la plenan tekston de la Deklaracio. Jen bela ekzemplo de tiu kunagado por kongruaj celoj, kiu povus kaj devus esti pli ofta fenomeno en la Esperanto-movado.

mf

Esperantistoj pledas por la rajtoj de minoritatoj en Rumanio

"Kion vi sentus, se estus veninta informo pri tio, ke iu... estus decidinta ĝisfunde neniigi la vilaĝon, kie vi naskiĝis, kaj la tutan regionon, kie viaj prauloj dum jarcentoj vivis?"

"Mia naskiĝvilaĝo baldaŭ estos ebenigita kun la tero."


Tiel skribas "al la tutmonda esperantistaro" d-ro Vidor Csiki, proteste kontraŭ la plano de la rumana registaro, neniigi inter ok kaj dek mil vilaĝojn, loĝatajn precipe de la hungara nacimalplimulto.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kongresante en Jyväskylä, Finnlando, la 18-an de julio 1988, "urĝe apelacias al la 'konscienco de la mondo', politikaj respondeculoj, ekleziaj gvidantoj, aktivuloj sur la tereno de homaj rajtoj, kulturaj movadoj kiel la Esperanto-movado, Unesko k.s., kun peto ke ili proteste intervenu por haltigi tiujn planojn kaj savi la viveblecon de miloj da homoj, inter kiuj plej multaj apartenas al minoritato."

Kaj Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), laŭ rezolucio de sia jarkunveno dum la Universala Kongreso en Roterdamo, postulas de la rumana registaro: 1. ke la membroj de la etnaj minoritatoj de Rumana Socialisma Respubliko estu traktataj samrajte kiel la membroj de la rumana etno; 2. ke ĝi reenkonduku la uzadon de la diversaj etnaj lingvoj en la publika vivo en regionoj, kie vivas la membroj de tiuj etnoj; 3. ke ĝi restarigu la lernejan sistemon de la etnaj minoritatoj kaj reebligu al membroj de tiuj etnoj senĝenan edukiĝon kaj lernadon en sia gepatra lingvo; 4. ke ĝi prizorgu ĉiujn kulturajn riĉaĵojn de sia lando, sendepende de la etno el kiu ili devenas; 5. ke ĝi ĉesigu la sensencan detruadon de vilaĝoj kaj devigan disloĝigon de ties loĝantaro; 6. ke ĝi ebligu la reunuiĝon de tiuj familioj, kies parto forlasis Rumanan Socialisman Respublikon, sen postuli de ili monan kompenson aŭ aliajn kondiĉojn.

D-ro Csiki finas sian alvokon jene: *"Je la spirito de la internacia Esperanto-amikeco kaj Zamenhofa homaranismo ni, esperantistoj, devas kune krei 'For la neŭtralecon!', se temas pri amasa masakro de la naciaj konscio kaj identeco!"*

Adresoj de la supraj organizaĵoj troviĝas en la Jarlibro kaj Gvidlibro, se la legantoj volas skribi deklari sian subtenon.



Malgranda sed valora paŝo al sennacieco kaj tutmondeco

“Se SAT [Sennacieca Asocio Tutmonda] pretendas esti ‘tutmonda’ kaj ‘sennacieca’, ĝi devas fariĝi tia kaj manifestiĝi tiel; tutmonde kaj sennaciece,” prave skribis la OKK [Organiza Kongresa Komitato] en la kongres-libro. Mi esperas, ke la OKK-anoj ne estis tro seniluziigitaj, ĉar el la 128 efektivaj partoprenantoj el 11 landoj, nur 40 venis el Eŭropo kaj neniu el Azio. Strange, kiam oni scias, ke tiu ĉi 61-a SAT-kongreso (Campos do Jordão, Brazilo, 6-13 aŭgusto), la unua en la Tria Mondo kaj Suda Hemisfero, jam antaŭ du jaroj estis antaŭvidita kaj aprobita de la SAT-anoj. Ba! kiuj ne venis ekscios, kion ili maltrafis...

Do etoso brazila, tio signifas vigecon, junecon, koloron. Ankaŭ Ledon-a kongreso – patro, patrino, filino estis OKK-anoj – tio signifis *modelan* kongreson. Modela ne nur laŭ materiala organizaĵo, sed ankaŭ laŭ la riĉeco kaj ekvilibro de la programo. Ĉiutage, matene, Cseh-seminario kaj laborkunsido. Post la tagmanĝo ekskurs(et)o, du prelegoj, kaj ĉiuvespere arta spektaklo.

Variaj estis la prelegoj: “Zamenhof kaj sennaciismo” de Zofia Fornalowa (Polio), “Manuskriptoj en la brazilia kultur-havo” de Lilia L. da Silva (Brazilo), “Sennacieco kaj klaneco” de Sylla Chaves (Brazilo), “Evoluo de homekspluatado” de Gilbert R. Ledon, “La romano en Esperanto ekde la jaroj 68” de Le Puil, “Ĉu la religio neas la individuon?” de Ivo Peyraut (Francio), “Historio de anarkiismo en Brazilio [tiel]” de Patrick Petiot (unuavide la publiko pli bone konis la temon ol la preleganto!), kaj la brila prelego “Imperiismo” de Roberto Resende.

Ne mankis la artistoj: Jerzy Fornal, el Polio, talente prezentis monodramon “Tajdoj de l’Vivo”, deklamis poemojn kaj pantomimis. Armelle LeQuint deklamis poemojn. Jorge das Neves kantis kun gitaro, kiu restis en sia ujo... (mi pripensos tion!), Joel de Castro, kiun konas la partoprenantoj de la UK en Braziljo [t.e. Brasília, la brazila ĉefurbo], ĉarmis la publikon per sia bela voĉo. La grupo Grisol (ankaŭ en la UK de Braziljo) prezentis kanzonojn kaj muzikojn el Ibero-Ameriko. La koruso el Legio de Bona Volo [vidu *Esperanto* 1988/p. 126] iomete eraris pri la publiko... Ĵak Le Puil recitalis (ne nur en UK,

kaj tok!). Flavio Fonseca estis por mi revelo. Tiu juna profesia kantisto (li jam registris plurajn diskojn) estas bonega esperantisto, majstre gitarludas, kaj plie lia voĉo estas tre agrabla. Nur bedaŭre, ke lia unua disko ne redonas tiujn kvalitojn. Kaj fine kabaredumis kaj parodiis la kongreson A. LeQuint kaj Ĵ. Le Puil, ja ja, nur duope ili tion sukcesis!... se juĝi laŭ la ridoj de la publiko.

Ankaŭ ne mankis “tipaj” prezentadoj, t.e. folkloraj dancoj de gaŭĉa grupo Os Quichas kaj bataldancoj de “capoeira” grupo Fonte de Gravata, kaj la nemalhaveblaj mulatinoj, kiuj sambadis kaj montris sian “kulturan flankon”, kiel ĵus skribis al mi brazila amiko!

Konklude tre riĉa kongreso, kiu eble sukcesos redoni al SAT novan vigecon.

Jak Le Puil (Francio)

Regiona kunveno vojmontras per ĉina-japana ĝemelado

Kvankam loka aranĝo en Esperantujo, la 36-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo komence de junio altiris 358 personojn el tuta Japanio kaj krome el Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉinio, Svisio kaj Usono. Aparte notinda estas la partopreno de delegacio el la ĉina urbo Changzhou, kiu per kontrakto amike rilatas al la kongresa urbo Takatuki. Sub la aŭspicio de la urbaj estraro, eduka komisiono kaj konsilio de kulturaj organizaĵoj, la kongreso – kiun kunorganizis Takatuki-Esperanto-Societo kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj – markis novan etapon en la progreso de la japana Esperanto-movado.

Ĉe la programo elstaris la publika simpozio “Kion ebligas Esperanto? – Historie kaj perspektive”; la edukaj kaj distraĵaj aranĝoj por urbanoj kaj komencantoj sub la nomo “Placo Esperanto”; kaj la kongresa universitato, kiu inkludis prelegojn de Konisi Gaku (“La esprimpovo de Esperanto”), Tanaka Hiroshi (pri lokusto-limigo en agrikulturo), kaj Zhang Zhenzhi (“La Esperanto-movado en Ĉinio”). Sed ne-ĉeestinton verŝajne plej impresos la spertoj de eksterlandano. S-ro Zhang Changsheng, vicprezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio, skribis pri sia vizito interalie jene:

“Ni sentis, ke ni jam dronis en atmosfero de varmega amikeco tuj post kiam ni paŝis sur la teron de Japanio. Neniu el ni parolis la japanan lingvon aŭ antaŭe vizitis Japanion. Tamen la duan tagon ni venis urbodomon kaj en ĝi la urbestro kaj aliaj urboficistoj de Takatuki interparolis kun ni por bonvenigo. Kun la helpo de japanaj esperantistoj, Esperanto estis nia sola interparola lingvo – ne nur dum la intervidiĝo, sed ankaŭ dum la tuta vojaĝo en Japanio... [Ĉe la kongreso] okazis dufoje kunsido de interamikiĝo kun ĉinoj, kiun ĉeestis ĉ. 40 personoj. S-ro Nisikawa Toyozo [la prezidanto de Takatuki-Esperanto-Societo] prezentis nin al ĉiuj ĉeestantoj, kaj s-ino Takeuti Tomiko klarigis kiel komenciĝis la reciproka komunikado inter niaj du urboj... Poste multaj interparolis kun ni pri la ĉina Esperanto-movado, pri nia edukado, niaj ĉiutagaj vivoj ktp. La aliaj parolantoj esprimis la deziron, ke la

ALVOKO AL IKU

En la kadro de la 74-a UK en Brighton (Britio) en 1989 okazos la 42-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU ĉe la sekretario: Prof-o Bruce Sherwood, Physics Department, Carnegie Mellon University, Pittsburgh PA 15213, Usono. Oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio, kaj biografieto antaŭ 1989 Januaro 15. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝajn kostojn. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU.


japanaj kaj ĉinaj esperantistoj plioftigu sian interfluron, menciante interalie la kruelajn okazintaĵojn dum la Dua Mondmilito...

La japanaj gastigantoj prizorgis ankaŭ imponan postkongresan programon. S-ro Zhang, lia kolego s-ro Zhang Zhenzhi (prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio), kaj la delegaciestro s-ro Yue Deben (vicprezidanto de Changzhou-a Federacio de Filozofio kaj Sociscienco, kaj estro de la prepargrupo por Changzhou-a Asocio de Amikoj de Esperanto) kune vizitis lernejon en Takatuki, Nacian Muzeon de Etnologio en Suita, la sidejon de Oomoto en Kameoka, la Pacmuzeon en Hiroŝimo, kaj plurajn aliajn lokojn. Vespere gastigis ilin esperantistoj kaj

aliaj organizaĵoj de la urbo Takatuki. S-ro Zhang resumis iliajn sentojn fine de la naŭtaga vizito: "Ĉio ĉi donis al ni ege profundan impreson. Por plue antaŭenigi nian amikecon kaj plifortigi nian komunan aferon de mondpaco, estas sendube necese, ke la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj starigu ankoraŭ pli intiman rilaton kaj daŭre marŝu manon en mano sur la vojo de kunlaboro."

(La supra raporto baziĝas sur la tekstoj de s-roj Zhang Changsheng kaj Takeuti Yosikazu; laŭ la kutimo en kaj Ĉinio kaj Japanio, familiaj nomoj aperas antaŭ personaj nomoj. La legantoj estas invitataj sendi informojn pri similaj iniciatoj, ekzemple kadre de "ĝemel-urba" agado, al la redaktoro de Esperanto.)

Dekstre: la ĉina delegacio pasigis neforgeseblajn tagojn en Japanio, gvidate interalie de s-ro Nisikawa Toyozo. Sube, la kongresa libro-servo gastigis faman verkiston Miyamoto Masao; la Kansaja Ligo delonge havas unu el la plej aktivaj librofakoj en la movado.



INFANA KONGRESETO

Ĉi-jare, plimulto kontentas

La jenan raporton verkis du el la partoprenintoj.

La Esperanta Infana Kongreseto oficiale komenciĝis vendredon la 22-an de julio je la sesa horo posttagmeze. Tamen plej multe da infanoj alvenis sabaton. Estis 33 infanoj, 6 helpantoj kaj 6 gvidantoj, el 15 landoj.

Ĉiuj estis dividitaj en 5 grupojn: Pandoj, Zebroj, Vulpoj, Tigroj kaj Kobroj, en kiuj krom infanoj estis po 1 gvidanto kaj helpanto. Ĉiutage matene post la matenmanĝo estis laboroj en grupoj: ni faris origamon, ornamaĵojn, muzikinstrumentojn, skribis taggazeton kaj ludis. Ĉiam antaŭ tagmanĝo ni ekzercis kantadon kaj babilis. Posttagmeze ni ekskursis. Ni vizitis porinfanan farmon, ventmuelejojn Kinderdijk, liliputan urbon Madurodam, marbordon, turon Euromast, naĝejon, kaj muzeon pri historio de Nederlando kiu ne estis tro interesa por ni. Ni ankaŭ prezentis nin en la kongresejo dum la Jubilea Festo.

Vespere ni ekzercis popoldancojn kiujn gvidis s-ro Ward el Belgio; kelkfoje ni rigardis lumbildojn. Dum unu ves-

pero venis al ni francaj skoltoj por kiuj ni kantis kelkajn Esperantajn kantojn, kaj poste ili bele kantis por ni.

Dum la semajno ni havis multe da libera tempo dum kiu ni ripozis, ludis, legis librojn, kaj boatis sur la kanaloj ĉirkaŭantaj nian kongresetejon. Estis tre amuze boati, ĉefe se iu falis en la akvon kiel ofte okazis. Ni ankaŭ laboris, ĉar ĉiam post la manĝo ni devis lavi la manĝilaron. Estis ankaŭ unu granda manko: ni ne povis bone duŝi nin, ĉar estis nur unu duŝilo por ĉiuj homoj, kiu troviĝis en la knaba lavejo.

Ĝenerale la kongreseto sukcesis. Ni pensas ke la plimulto de la partoprenantoj estis kontenta.

David kaj Vera Pochanke (Pollando)

La organizadon de la IK ĉi-jare estris Christopher Fettes, irlanda instruisto kiun la Estraro de UEA nomis Komisiito pri Infanaj Aferoj. Kunhelpis la loka organizonto de la venontjara kongreseto, plus nederlandaj kaj aliaj volontuloj. Subtenajn donacojn eblas sendi al la roterdama adreso de UEA, de kiu laŭeble baldaŭ haveblos la aliĝilo por IK '89; urĝajn demandojn direktu al s-ro Fettes, p/a St. Columba's College, Dublin 16, Irlando.

Vojaĝeblecoj ekdonas allogon al la sovetia junulara movado

Se *baldi* signifas “veni tro frue ien” (vd. “Kongreseroj” en la lasta numero), *seguri* povus egale bone signifi, “maltrafi okazaĵon kaj tamen veni”. Efektive, kiam la sovetia junulara aktivulo Valentin Seguru ne sukcesis ricevi nederlandan vizon ĝustatempe por atingi la roterdaman UK, li simple ensaltis aviadilon kaj venis por la dua duono de aŭgusto al la Centra Oficejo. Mi kaptis la okazon por iom paroli kun li pri lia landa movado.

MF: *Via nuna projekto estas la organizo de la dua internacia renkontiĝo en Sovetunio, ĉu ne?*

VS: Jes, ni esperas ke per frua anonco de ĝi ni povos altiri pli da alilandanoj ol pasintjare, ĉe la unua Inter-SEJT [Internacia-Sovetia Esperanta Junulara Tendaro] en Rostovo. Tiam venis inter 150 kaj 160 homoj, sed ni nur lastmomente sukcesis varbi kelkajn junajn bulgarojn kaj hungarojn. Ĉi-foje ni havas pli modernan kaj komfortan ejon, en la urbo Minsk, kaj ni atendas aliĝojn jam en novembro por la semajno komence de aprilo.

MF: *Ĉu la aranĝon organizas la loka movado?*

VS: Ekzistas tri kluboj en Minsk, sed estas la Junulara Komisiono kiu aŭspicias kaj organizas la internaciajn tendarojn, kunlabore kun la loka movado. Same kiel en Rostovo, ni uzas ejon de la buroo pri internacia junulara turismo, Sputnik, kaj tio plifaciligas la aliĝon de eksterlandanoj; ili povas kontakti la reprezenteton de Sputnik en sia lando. Tamen, se ili deziras resti en Sovetio pli longe, ni povas prizorgi por ili apartan programon.

MF: *Vi menciis la Junularan Komisionon. Kio precize ĝi estas?*

VS: Temas pri grupo de junularaj aktivuloj kiu havas reprezentantojn en preskaŭ ĉiuj respublikoj de Sovetunio. La lokaj movadoj fakte agas plejparte memstare, do la JK ne okupiĝas pri lokaj aranĝoj, nur pri kunordigo, planado, kaj – ni esperas – almenaŭ unu internacia aranĝo jare. Nia kalendaro enhavas entute 20-30 tendarojn je diversaj niveloj.

MF: *Kaj ĉu vi efektive sukcesas teni kontakton inter vi, malgraŭ la vastaj distancoj?*

VS: Mi dirus ĝenerale, ke jes. Preskaŭ ĉiun tendaron ĉeestas homoj el ekster la regiono; oni sukcesas havigi monon de la loka Komsomol-branĉo, de urbaj instancoj, eĉ de sia entrepreno, por helpi pagi la vojaĝon. Almenaŭ unufoje jare la tuta Junulara Komisiono kunvenas, kadre de la estrar-kunvenoj de ASE [Asocio de Sovetiaj Esperantistoj]. La ASE-estraro estas kiel la Komitato ĉe UEA, ĉ. 65 homoj el la tuta lando. Do ni tamen sukcesas resti en kontakto kaj plani komunan agadon. Kaj ni fakte trovas la strukturon de la Komisiono utila ankaŭ por stimuli la organizadon de lokaj aranĝoj.

MF: *Kaj el kio konsistas ĉi tiuj tendaroj? Oni aŭdas, ke ili havas iujn apartajn trajtojn.*

VS: Estas komunaj ecoj kaj apartaj ecoj, kiel ĉe la landoj. Unu afero: En Sovetio ekzistas, ni nomu ĝin “kantema” movado, kiu havas dekojn da kluboj en ĉiu urbo, kaj ekzistas parta kovriĝo inter ĝi kaj la Esperanto-movado. Do oni ofte sidas ĉirkaŭ la tendara fajro kaj kantas tra la nokto, tiel ke multaj emas tradormi la pro-

gramon pri kiu zorgis la organizantoj. . . . Estas ankaŭ la konkurso de gajeco kaj spriteco, kiu tiel plaĉis al la hungaroj pasintjare ke ili decidis mem enkonduki ĝin. Konkursas du teamoj de tendaranoj, kaj aparte la du kapitanoj, pri plenumo de spontanaj, improvizaj prezentoj, ofte tre amuze. . . . Estas la tiel nomata “verda polico”, kiu subaŭskultas krokodilojn kaj “premierojn” ilin ĉe la matena komuna kunveno. Kaj krome estas tendara universitato, kunsidoj pri movadaj aferoj ktp – por la veraj aktivuloj.

MF: *Kaj kiujn perspektivojn vi vidas por la “veraj aktivuloj” en la proksima estonteco?*

VS: Mi opinias, ke nia movado havas grandan avantaĝon super la aliaj, ni diru sociaj movadoj en Sovetunio, pro la ebloj de vojaĝado. Nuntempe junajn homojn plej allogas vojaĝoj, renkontiĝoj, kontaktoj kun aliaj landoj, kaj mi vidas en tio la plej grandan forton de la Esperanto-movado. Ni ĝis nun tute ne eluzis niajn eblojn, helpi al homoj ekkoni la mondon. Pli gravas partopreno, uzo, konkreta apliko de Esperanto, ol ia ajn teorumado.

Helpas nin krome, ke la nuna tutlanda politiko en Sovetunio emfazas la memstariĝon de sociaj organizaĵoj. La Junulara Komisiono lastatempe starigis juran fonduson kun bankokonto, kiu ebligas al ni memstare organizi turismon. Ni pripensas pli aktivan partoprenon en la

ASE kaj ĝia Junulara Komisiono anoncas:

**2-a Internacia Sovetia
Esperantista Junulara Tendaro
29 marto-05 aprilo 1989
en Minsk, ĉefurbo de Belorusio**

Restadkoston pagu pere de la reprezenteto de la turisma buroo “Sputnik” en via lando (informoj ĉe sovetiaj ambasadejoj). Aliĝkotizon pagu surloke.

Bonvolu anonci vin ĉe via landa asocio aŭ ĉe ni, koncerne vojaĝplanojn, programkontribuon k.s.:

Junulara Komisiono, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, prosp. Kalinina 14, SU-103885 Moskvo H-9, Sovetunio.

Pasporta Servo, eble per aranĝo de rondvojaĝoj kaj tranoktado ĉe esperantistoj, ekzemple en la tiel nomata “Ora Ringo” en la regiono de Moskvo. Kaj kompreneble interŝanĝoj estas alia eblo: ekzemple, mia propra urbo, Ivanovo, ĝemelas kun la pola urbo Lodzo, kaj ni nun kontaktis polajn esperantistojn kun la propono fari reciprokajn vizitojn.

Mi rimarkis lastatempe, ke la sinteno al Esperanto ĉe ni fariĝas tre favora. Ekzemple, la estro de mia fako, kiam li eksciis ke mi okupiĝas pri Esperanto, mem petis ke mi faru standon pri ĝi, sen ajna instigo miaflanke. [VS faras esplorojn pri statika elektro en teksaĵ-instituto. – red.] Ankaŭ montriĝis facila akiri monon de la urbo, por ke la biblioteko abonu Esperantajn revuojn. Do, ŝajnas al mi ke ni ne bezonas atendi iun grandan organizan paŝon aŭ ĉiokovran laborplanon; sufiĉas eklabori laŭ tio, kion oni mem trovas plej grava kaj farinda.

(intervjuis Mark Fettes)

Inspire kaj aktive en Zagrebo

La trajno de Munkeno al Ateno estis plenplena, kiam ĝi atingis Zagrebon. Preskaŭ la tuta jugoslavia armeo ŝajnis vojaĝi per ĝi, sed post kelkaj momentoj de pelado kaj puŝado amasetoj da "pacaj batalantoj" elŝoviĝis jen kaj jen el la trajno. Junaj esperantistoj el tuta Eŭropo renkontiĝis sur la kajo por esti bonvenigataj de la akcepta servo de la 44-a Internacia Junulara Kongreso.

Helpemaj reprezentantoj de la Loka Kongresa Komitato (LKK) akompanis la alvenintojn al ne malpli plena aŭtobuso, kiu veturigis la esperantistojn al "Nova Zagrebo". En tiu nubskrapula loĝkvartalo troviĝis la moderna kongresejo. Kelkaj eksterlandanoj tuj povis konatiĝi kun la kongresa temo "Komunikado en la 21-a jarcento", pro-vante komuniki kun la ŝoforo, kaj sekve forlasis la buson ĉe la malĝusta haltejo... Nu, la publika transportsistemo kompanse estis senpaga por kongresanoj.

Dum la interkona vespero devis interkonatiĝi 769 partoprenantoj el 46 landoj. Tiom amasa junulara kongreso riskas esti anonima kaj izoliga, sed LKK tuj sukcesis flamigi la etoson, tiel ke ĉiuj jam sentis sin inter "fratoj kaj fratinoj el la tuta mond'", kiel tekstas kanto de la rok-muzika grupo Amplifiki. La plej elstarajn momentojn de tiu ĉi vespero filmis la "kongresa televido" sub la gvido de Kruno Tišljariĉ; ĝi aktivegis dum la tuta semajno kaj sukcesis prezenti tre lerte faritajn kaj amuzajn vidbendajn raportojn pri la kongrestagoj.

La postan tagon, reprezentanto de la junulara tegmenta organizaĵo de Jugoslavio malfermis la kongreson – diplomatia mispaŝo, ĉar tion devus fari la prezidanto de TEJO, kiu bedaŭrinde ne ĉeestis. Nu, la publiko ne tiom ĝeniĝis kaj ĝuis la lertan programgvidadon de Nikola Raŝiĉ, la LKK-prezidanto. Posttagmeze, dum la komitatanoj de TEJO jam povis buĉi unu la alian en sia unua kunsido, komenciĝis la tema programo. Krom multaj aktivigaj laborgrupoj (interalie por prepari la kongresajn ĵurnalon, televidon kaj radion, por prepari skeĉojn, por korusi, komputi, danci ktp), dum la tuta semajno okazis scienca kolokvo pri diversaj aspektoj de la kongresa temo. Renomaj prelegantoj kaj diskutgvidantoj altigis la nivelon de tiu aranĝo: Rüdiger Eichholz el Kanado prezentis sian perkomputilan terminologian laboron, kunlaborantoj de la nederlanda firmao BSO spektigis aŭdvidaĵon pri la traduk-sistemo DLT, Ilona Koutny el Budapeŝto paroligis komputilon. Ĉiutage, la efektive scienca programo eĉ plurfoje kulminis, tiel ke la salono estis plena jam frumatene.

Aparte interesa estis la prelego de Raŝiĉ, ne nur LKK-prezidanto sed ankaŭ sociologo, kiu prezentis la rezultojn de sia sociologia enketo inter esperantistoj. Li konstatis interalie, ke ili scipovas averaĝe 3,4 lingvojn kaj estas tre toleremaj; tamen ili – laŭ li – ne tiom legemas, almenaŭ kiam temas pri Esperanto-literaturo, sed preferas dum oftaj vojaĝoj profiti de siaj internaciaj kontaktoj sen lingvoproblemo. Mi nur povas esperi, ke lia studo estos baldaŭ aĉetebla, kaj ke ĝi disvastiĝos ankaŭ ekster la Esperanto-movado.

La kongreso kompreneble ankaŭ ebligis konatiĝi kun la



Supre, la televida skipo; dekstre, la katalunoj festas sian aliĝon al TEJO per kantoj; sube, la prezidanto de UEA (kaj eks-TEJO-estro) unutage ĉeestas por kunsoloni la 50-jariĝon de la organizaĵo.



bela urbo Zagrebo kaj kun la respubliko Kroatio. Ĉiutage, okazis urbogvidado kaj diversaj vizitoj. Kiu partoprenis viziton al la urbocentro, devis (piede) sekvi abundan programon, ĉar Zagrebo ja havas iom da vizitindaĵoj, kaj tial ofte nur la laceco de la partoprenantoj bremsis la bone informitajn kaj entuziasmajn lokulojn. Tre bona estis ankaŭ la tutaga ekskurso al Kumrovec kaj Trakoŝĉan, kiu ne nur konatigis nin kun historie kaj pejzaĝe interesaj lokoj de la respubliko, sed ankaŭ permesis al ni refreŝiĝi, post ŝvitiga busveturado, en idilia lago piede de la kastela monteto de Trakoŝĉan. Dank' al nia tre sperta gvidanto Neven Kovaĉiĉ, ni povis ankoraŭ multe lerni dum la ekskurso.

La plej gravaj programeroj de junulara kongreso estas kompreneble tiuj de la mallumaj horoj. Mi tre ŝatis, ke la publiko neniam devis resti pasiva dum la vesperaj kaj noktaj programeroj: dum la nacia vespero kaj la rok-muzika nokto la spektantoj ne estis bremseblaj kaj kun-aktivis kantante, dancante kaj umante. Subĉiela rok-muziko dum somera nokto bele etosigas! La grupo Persone pruviĝis sufiĉe lerta kaj tekste kaj muzike, dum la nova "konstelacio" de Amplifiki (sen la "stelulo" Kim) ne regajnis la korojn de ĉiuj aŭskultantoj. Dum la internacia kaj adiaŭa vesperoj, novaj kaj malnovaj talentoj el ĉiuj partoj de la mondo prezentis sin. Tre sukcesaj estis la kontribuo de la internacia ĥoro sub la "skaldoskolda" gvido de Kostas Zafarakis el Grekio kaj la lerta prezentado de la internacia orkestro. Certe, la adeptaro de klasika muziko pligrandiĝis tiuokaze. La skeĉprepara grupo entuziasmigis



eĉ IJK-veteranojn per bukado el novaj kaj malnovaj skeĉoj – kompreneble pri la kongresa temo.

Mirinda kongreso! Nur bedaŭrinde tro mallonga, kiel kutime, krom por tiuj ne malmultaj, kiuj ankoraŭ post-kongrese ĝuis kelkajn tagojn da jugoslaviaj suno, gastamo kaj etoso. Mi pensas, ke ĉiuj ĝuintoj de tiu elstara IJK jam senpacience atendas la venontan someron por partopreni la 45-an IJK en Kerkrade, Nederlando.

Martin Haase (FR Germanio)

JUNULARO

Helpu realigi viajn iamajn revojn

Kio estas patrono de TEJO? Unue nek membro nek donacanto. Ĉiu membro de UEA sub 26 jaroj fariĝas aŭtomate membro de TEJO; donacanto mone apogas TEJO sen ricevi ĝiajn servojn.

Patronoj estas esperantistoj pli ol 26-jaraj kiuj interesiĝas pri la junulara sekcio de UEA, deziras subteni ĝian agadon kaj samtempe esti informitaj pri la TEJO-laboro. Ili ricevas *Kontakto*, la kulturen revuon de TEJO; *TEJO tutmonde*, ĝian primovadan dumonatan gazeton; kaj, ekde 1989, la Estrar-raporton de TEJO. Tiuj, kiuj

ĉeestas la UK, estas oficiale akceptataj de la tieaj TEJO-representantoj, kaj ricevas ŝancon pridemandi, komenti, kaj eĉ konsili la junularan agadon.

Kial TEJO bezonas patronojn? Tutsimple, ĉar la membroj de TEJO ne estas sufiĉe riĉaj por realigi siajn multnombrajn ideojn. Estrarkunsidi, reprezentiĝi ĉe internaciaj junularaj konferencoj, funkciigi komisionojn, eldoni gazetojn kaj broŝurojn, organizi seminariojn, kotizi al junularaj internaciaj organizoj, monkompensi (modestege) volontulan laboron, ĉio ĉi kaj aliaj taskoj multekostas, multe pli ol kion povas pagi senenspezaj junuloj.

Vi, kiu estis junulo antaŭ kelkaj jaroj, konscias ke nia laboro gravas. Se vi perdis iom de via juneco, vi certe gajnis iom pli da materia sekureco, ĝuste tion kion vi bezonis por realigi viajn revojn antaŭ kelkaj jaroj. Ebligu al la nunaj junuloj la efektivigon de iliaj esperantiste realismaj revoj. Fariĝu patrono de TEJO en 1989.

Al tiuj kiuj estis patronoj de TEJO ĝis 1987 kaj ĉesis pagi patronan kotizon en 1988 pro ĝia duobliĝo, ni ŝuldas klarigon. Post la reordigo de la kaso de TEJO, montriĝis ke la malnova kotizo ne plenumis sian celon: post la sendado de *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*, kaj diversaj elspezoj ligitaj al la patronoj, restis nenio el la patronaj kotizoj. Duobligante ĝin, ni nur deziris kongrui la kasan realon kun la celo de tiu patrona kotizo. Ni forte esperas ke vi komprenos kaj aprobos nian decidon, kaj ke ankaŭ vi fariĝos patrono de TEJO en 1989.

Antaŭe dankas **Claude Rouget**, estrarano pri financoj de TEJO.

TEJO-AFEROJ

Teknika adreso de TEJO

Laŭ decido de la Komitato en Zagrebo, ĝenerala poŝto por TEJO iru al la ĝenerala sekretario Didi Weidmann, Pf. 639, CH-8201 Schaffhausen, Svislando; tel. (+41 53) 25 51 02; telekso 896399 th kb ch; telefakso (+41 53) 25 90 06 (ĉe telekso kaj telefakso ĉiam indiku "por Didi Weidmann, tel. 255102").

Landa agado

Aliĝis en Zagrebo du novaj landaj sekcioj, Katalunio kaj Malagasio (Madagaskaro). Tiun lastan subtenas Junularo Esperantista Svislanda kadre de formala ĝemel-aranĝo. TEJO alvokas al similaj paŝoj flanke de siaj aliaj landaj sekcioj.

Kultura servo

TEJO pretas organizi preleg-vojaĝojn de individuaj esperantistoj tra fremdaj landoj. Se vi jam havas vojaĝplanon kaj ŝatus paroli kun kaj gastoj ĉe lokaj movadanoj, anoncu vin ĉe la ĝenerala sekretario (adreso supre). Indiku i.a. la temojn, kiujn vi pretus pritrakti.

Internaciaj organizaĵoj

Bonvolu informi la ĝeneralan sekretario, se vi intencas partopreni iun ajn ne-esperantistan konferencon, aŭ se vi membras/aktivas en alia internacia organizaĵo. La celo estas kunordigi la esperantistan partoprenon/agadon ĉe eksteraj forumoj.

En la duan jarcenton: Strategia Plano de Universala Esperanto-Asocio

Pasis pli ol 26 jaroj de kiam oni laste publikigis projekton de Laborplano en ĉi tiu revuo, kun la celo elvoki reagojn kaj kunlaboron je ĝia finpretigo. Tiel longa intertempo jam sufiĉus por pravigi la sekvajn dek paĝojn. Sed aldone, temas pri nova stilo de prezento, espereble pli travidebla kaj pli utila ol la antaŭaj. Do, nepre plulegu, kaj sendu viajn kritikajn komentojn kaj specifajn proponojn por ŝanĝo al la prezidanto de UEA kaj al la Centra Oficejo (po unu kopio – adresoj ĉe la interna frontkovrilo).

Por tiuj, kiuj serioze interesiĝas pri la temoj strategio kaj planado, rekomendindas aĉeti de la sesdek tajpitaj paĝoj da referaĵoj el la simpozio "UEA — al nova strategio por nova jardeko" (vd. Esperanto 1988/p. 144): 15 guldenoj, inkluzive la aerajn sendokostojn, sendendaj al la Centra Oficejo kun indiko "simpoziaj aktoj". Reagoj, pliaj kontribuoj k.s. estus same bonvenaj ĉe la redakcio, kiu celos ebligi multflankan diskuton per aperigo de reagoj en la revuo, eventuala portempa cirkulero, aŭ aliaj rimedoj — depende de la nivelo de interesiĝo.


planado en la post-milita UEA

celoj? utilo?



taskoj de la nuna Plano

nova koncepto



1. ENKONDUKO

11. La Unua Baza Laborprogramo de UEA estis akceptita de la Komitato en 1955. Dua Baza Laborplano aprobiĝis en 1962, kaj Tria Baza Laborplano en 1973, en la Universala Kongreso en Beogrado. Kvankam UEA laboris en postaj jaroj laŭ la spirito de la Beograda laborplano, kaj kvankam estis akceptitaj laborplanoj kaj programoj por specifaj agadoj aŭ observoj, de post 1974 UEA laboris dum iom da tempo sen ĝenerala, inkluziva laborplano. Precipe la Plano de 1973 estis multe kritikata ĉar ĝi estis tro inkluziva, ne donante adekvatan ideon pri la prioritatoj de la Asocio, sed listigante ĉiujn agadojn sen klarigo pri relativa emfazo. Pli modestaj klopodoj fiksi prioritatojn, ekzemple la Taskaro Prioritata ellaborita de la Estraro kelkajn jarojn post akceptiĝo de la Tria Laborplano, iom helpis la Asocion distingi la vojon inter la diversaj ofte belaj ideoj aŭ agadoj, kiuj simple superus la kapablon de la Asocio ilin plenumi. Helpis ankaŭ la debato ĉirkaŭ la nova statuto de UEA, akceptita en 1980. Sekvis Kvara Laborplano por la periodo 1983-1987, surbaze de la rezolucioj el seminario en Bad Saarow, GDR, kiu kombinis ĝeneralan laborplanon kun prioritatoj. Ĝi estis kompletigita per taskaro por la Jubilea Jaro, publikigita en la libreto "Kiu Faru Kion". Lastatempe (julio 1988) akceptiĝis Laborplano de TEJO 1988-1992, kiun ni ankaŭ prenis en konsideron en pretigo de tiu ĉi Strategia Plano.

12. Laborplano, kiu simple listigas ĉiujn jam faratajn agadojn kaj proponas pli-intensigon, ne helpas organizaĵon orientiĝi. Same, laborplano, kiu rigore fiksis tre malmultajn grandajn prioritatojn kaj ĉesigas aliajn agadojn, riskas resti neglektata, krom se ĝi havas grandan kaj fortan subtenon de ĉiuj tavoloj de la organizaĵo: la tiro de investitaj interesoj estos tro forta por haltigi la neprioritatajn laborojn. Necesas stiri inter la du: fiksi ĉefajn prioritatojn, sed ne proponi drastajn novajn direktojn sen profunda debato je ĉiuj niveloj.

13. La antaŭaj laborplanoj de UEA havis fiksan tempodaŭron. Kvankam ili ja estis ŝanĝeblaj post akceptiĝo, ili esence fiksis la Asociajn evoluliniojn dum difinita periodo. La nuna dokumento estas konceptita laŭ aliaj principoj. Ĝi prezentas strategion de la Asocio bazitan sur zorga analizo de niaj fortoj kaj malfortoj. Ĝi ankaŭ donas bazajn gvidliniojn por la evoluo de la diversaj agadoj de la Asocio. Ĝi ne havas specifan tempodaŭron: ĝi estas evoluanta dokumento, kiun la Asocio devas konstante kontroli, elprovi kaj modifi laŭ la ŝanĝiĝantaj bezonoj. Surbaze de tiu ĉi dokumento, oni povus, se oni trovis tion necesa, elverki specifajn planojn por specifaj agadoj kaj specifaj periodoj: la Strategia Plano do restas matrico, aŭ kerno, de la planada procedo. Verŝajne ja necesos plidetaligi aspektojn de tiu ĉi strategia dokumento en formo de specifaj subplanoj, kaj certe necesos modifi la Planon mem de tempo al tempo.

14. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, okazis certagrada decentriĝo de la planado kaj iniciatado. Unuopaj estraranoj ellaboris siajn proprajn strategiojn kaj ilin klopodis plenumi; la Centra Oficejo iris sian vojon; en la Komitato de UEA regis ioma necerteco pri la strategio de la Asocio. En la venonta periodo, ni devas celi pli disciplinan kaj centrigitan strategion, kaj insisti, ke la kunlaborantoj sekvu ĝin. Aliflanke,

ĝuste pro tiu strategio oni povos decentrigi la laboron, kun certeco ke la unuopa kunlaboranto havos je sia dispono bazan principaron de la laboro, anstataŭ labori sen gvidlinioj. Alivorte dirite: se oni volas la laboron kaj enpreni pli da homoj en tiun laboron (kaj tio ja necesas!), oni devas certigi, ke ĉiuj kunlaborantoj akceptas kaj laŭiras *centran* ĝenerale interkonsentitan strategion.

2. BAZAJ CELOJ DE UEA

21. Post profunda pridiskuto, oni interkonsentis en 1980, okaze de akceptiĝo de la nova statuto, pri kvar ĉefaj celoj de la Asocio. Ili estis bazitaj sur la malnova statuto, sed kun kelkaj ŝanĝoj. Tiuj celoj konsistigas la laŭstatutan ekzistokialon de UEA. Ĝis ni ŝanĝos nian statuton, ili restos deirpunkto de kiu ajn nia laborstrategio. La kvar celoj estas jenaj:

- (a) *Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto.*
- (b) *Agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon.*
- (c) *Plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo.*
- (ĉ) *Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.*

22. La unua celo emfazas la neceson instigi la praktikan utiligon de la lingvo, per informado, per politika kaj socia agado (ne partipolitika, ĉar ni ja estas neŭtrala asocio, sed tamen per engaĝiĝo en la socion), kaj per instruado.

23. La dua celo implicas interesiĝon ne nur pri Esperanto sed pri la lingva problemo ĝenerale, kaj pri solvado de lingvaj kaj komunikaj problemoj. Parto de la taskoj de UEA estas esplori la lingvan problemon, kaj informi la eksterstarantojn pri ĝiaj dimensioj. Ĝis ili konscios, ke ekzistas lingva problemo, kaj ke Esperanto povus solvi ĝin, ili restos neatingeblaj per niaj instruiloj kaj niaj servoj.

24. La tria celo implicas, ke UEA celas faciligi ĉiujn kontaktojn inter la homoj en spirito de reciproka respekto, do ke neniuj internacia medio estas ekster ĝia intereso aŭ povo. Interalie tiu celo implicas la engaĝiĝon de UEA en la laboron de internaciaj organizaĵoj kaj en internaciajn interŝanĝojn.

25. Sed se tiu tria celo implicas senpartian kaj neŭtralan aliron al ĉiuj komunik-linioj internaciaj, la kvara celo egale forte implicas, ke ni celu krei inter la membraro de UEA senton, ke ili formas parton de movado, kaj ke tiu movado estas bazita sur kompreno kaj estimo inter la anoj de diversaj popoloj. Tiu kvara celo memorigas nin pri la fakto ke Esperanto sukcesas kaj vivas cent jarojn post sia fondiĝo interalie pro tio, ke la uzantoj de la lingvo zorgas pri sia propra kulturo, siaj valoroj kaj sia sento de aparteno al unika internacia movado.

26. La unua celo estas la bazo de nia agado: disvastigi Esperanton. La dua celo memorigas nin, ke tio ne eblas sen konscio de la bezono de Esperanto. La tria celo atentigas, ke Esperanto estas uzebla de ĉiuj personoj kaj ke ni, kiel uzantoj de Esperanto, interesiĝas pri ĉiuspecaj internaciaj kontaktoj. La kvara celo memorigas nin, ke ene de la Esperanto-movado necesas havi pli fortan ligon ol tiu ĝenerala celo faciligi la kontaktojn.

3. LA RIMEDOJ JE NIA DISPONO

31. La rimedoj, kiujn ni disponas por plenumi niajn celojn estas klasifeblaj laŭ kvar diversaj kategorioj: financaj rimedoj, organizaĵoj, homaj rimedoj, kaj organoj kaj agadoj. (Povus ekzisti aliaj klasifaj sistemoj. Ni elektis tiujn pro ilia relativa klareco.)

32. Financoj

321. Sen financaj rimedoj, UEA ne kapablas funkcii. Iagrade ĝiaj energioj devas esti dediĉitaj al akiro de financaj fortoj – temo ankoraŭ tro neglektata inter la prioritatoj de la Asocio. Nuntempe la rimedoj venas el kvar ĉefaj fontoj: membrokotizoj, kongresoj, vendoj kaj donacoj.

322. La membronombro de UEA restas tro malalta, precipe se oni konsideras ke la kotizoj estas la ĉefa fonto de financaj rimedoj, kaj ke la kelkmilopa individua membraro konsistigas la ĉefan alireblan merkaton por la vendaĵoj de UEA (servoj, libroj ktp).

323. La profito kaj aliaj enspezoj el Universalaj Kongresoj fariĝas pli kaj pli gravaj elementoj en la ĉiujara buĝeto de la Asocio. Tiu mono estas la ĉefa rimedo por subteni la informadan laboron kaj diversajn novajn iniciatojn. Pro tiu kialo, se ne

celo: decentrigo per konsento pri centraj principoj

Ĉapitroj 2-4 formas skizon de la nuna stato de UEA, kiel bazo por planado.




Ekzempleroj de la Statuto daŭre haveblas senpage de la Centra Oficejo. Se vi ne havas, petu kiam vi sendas vian reagon.

Vidu ĉapitron 5 por plidetalingo de ĉi tiuj ideoj.

Vidu ĉapitron 6.
Al subĉapitroj 32-35 (analizo de la nunaj rimedoj) respondas ĉapitroj 6-9 (planoj uzi kaj pligrandigi la samajn rimedojn).



Vidu ĉapitron 7.



Fake



Vidu ĉapitron 8.



Kiel uzi ĉiujn homrimedojn?

Vidu ĉapitron 9.

ekzistus aliaj kaŭzoj, necesas, ke ĉiujare okazu granda kaj impona kongreso interesa al multaj uzantoj de Esperanto. La UK ne plu estas nur elemento en la *programo* de la Asocio, sed grava fonto de *enspezoj*.

324. Iom similan rolon ludas la libroeldonado kaj la libroservo. Kvankam oni povus argumenti, ke la neta gajno el tiu agado estas malgranda aŭ, laŭ iuj kalkuloj, neekzistanta, ĝi estas esenca elemento en la financa moviĝo de la Asocio. La Asocio devos serĉi ankaŭ aliajn enspezigajn agadojn, kaj revivigi tiujn, kiuj jam ekzistas, ekz-e turismajn aranĝojn.

325. Nur eta parto de la disponebla mono de esperantistoj efektive fluas al Esperanto. Estas vere, ke esti aktiva esperantisto povas esti multekosta flankokupo (temas pri elspezoj por vojaĝado, aĉeto de libroj, ktp), sed estas ankaŭ tute klare, ke ni povus ricevi multe pli da donacoj ol ni nun ricevas, se nia agado estus pli kohere plenumata kaj prezentata al niaj membroj, kaj se ni pli sisteme kaj konscie varbus donacojn. Nur se niaj membroj pretos multe pli malavare subteni nian agadon, ni sukcesos kreskigi kaj pliefikigi tiun agadon. Ili faros tion se ilia fido je la laboro de UEA plialtiĝos.

33. Organizaĵoj

331. UEA estas pli ol simpla asocio: ĝi estas federacio de kunlaborantaj organizaĵoj, kaj ĝi estas la kerna asocio en tuta Esperanto-movado, kies diversaj elementoj estas diversmaniere ligitaj. Formante strategion por UEA, ni ne povas ignori tiun kunligitecon de la Esperanto-movado, nek malatenti la centran rolon de UEA. Igrade la Plano de UEA konsistigas strategion de la Esperanto-movado kiel tuto.

332. Ni povas do nombri la jenajn organizaĵajn elementojn inter la rimedoj disponeblaj, almenaŭ parte, por plenumi tiun strategion: landaj asocioj, plejparte kontrakte ligitaj al UEA, kvankam ne ĉiuj; fakaj asocioj, same; aliaj Esperanto-institucioj kun diversaj roloj (akademioj, bibliotekoj, muzeoj, eldonejoj, gazetoj, ekzamenaj instancoj, ktp); similcelaj organizaĵoj. Ĉi-lastata kategorio konsistas el ne-registaraj organizaĵoj, kies celoj parte koincidas kun la niaj, favoraj al Esperanto, el parlamentaj grupoj, el neesperantistaj eldonejoj kiuj publikigas ankaŭ verkojn en aŭ pri Esperanto, radio-stacioj ktp.

333. Apartan lokon okupas la junularo. TEJO estas samtempe integra parto de UEA kaj aparte funkcia, plejparte memreganta asocio. Ĝi do povas esti konsiderata aŭ kiel aparta organizaĵo, komparebla kun landaj kaj lokaj asocioj, aŭ kiel organo de UEA mem.

334. La rilato inter tiuj diversaj organizaĵoj kaj la centra UEA devas esti rilato de reciproka kunlaboro: UEA devas montri, ke ĝi povas helpi ilin plenumi la diversajn celojn, kiujn ili fiksas por si mem. Reciproke, ĝi povas atendi ilian helpon en la plenumo de la pli granda strategio ĉi tie priskribata.

34. Homaj Rimedoj

341. La kunlaborantoj en UEA kaj en aliaj apudaj organizaĵoj estas diversmaniere disponeblaj al la Asocio. Ilia nivelo de engaĝiĝo dependas parte de ilia profesia statuso (studento, homo meze de profesia kariero, emerito), parte de ilia geografia kaj ekonomia situo (facileco de vojaĝado kaj korespondado, disponeblaj personaj financoj), de familia situacio, ktp. Ne malpli grava estas la sento de lojaleco al UEA, kiun plintensigas kohera, efika kaj videble celkonscia agadprogramo.

342. Oni povas distingi ĉe la pinto de la Asocio tri grupojn de homoj: la stabanojn, kiuj profesie laboras por UEA kiel oficistoj; la Estraranojn, elektitajn de la Komitato por plenumi ĝiajn gvidliniojn, kaj la Komitatanojn, kiuj reprezentas la membraron de UEA kaj ĝiajn diversajn konsistigajn landajn kaj fakajn asociojn. Kvara grupo de diversspecaj gvidantoj laboras kiel komisiitoj de UEA aŭ en gvidaj pozicioj en aliaj Esperanto-organizaĵoj. Kvina grupo konsistas el anoj de la Delegita Reto de UEA. Sesa grupo konsistas el individuaj membroj, sepa el aligitaj membroj, oka el esperantistoj kiuj ne estas membroj de UEA, kaj naŭa el neesperantistaj simpatiantoj.

343. Rilate al ĉiu grupo UEA devas havi sian politikon. Kiun rolon, ekzemple, ludu estraranoj? Ĉu ili laboru esence kiel sensalajraj oficistoj, aŭ ĉu ilia rolo estu malpli plenuma kaj pli konsila? Kiun rolon havu komitatanoj, aŭ Delegitoj? La strategio de UEA devas celi engaĝi kaj, en plej pozitiva senco, ekspluati ĉiujn tavolojn laŭ plej efika maniero.

35. Organoj kaj Agadoj

351. Ni povas distingi tridekon da diversaj funkcioj aŭ agadoj de UEA. Unuflanke ni devas memori, ke tiuj diversaj funkcioj ofte havas longan historion kaj do ne estas senpense forlasindaj; aliflanke ni devas konscii, ke ne havas sencon daŭrigi agadon,

kiu ne plu plenumas klare difinitan celon.

352. La plej gravaj nunaj *agadoj* de UEA (kontraste al taskoj, kiel ekzemple librotenado, kompostado aŭ membroadministrado) estas klasifeblaj jene:

- (a) Eldonado ktp (periodaĵoj, libroj kaj aliaj eldonaĵoj, libroservo)
- (b) Kongresoj
- (c) Esploro kaj dokumentado (*LPLP*, biblioteko, konferencoj de CED)
- (ĉ) UN kaj Unesko
- (d) Regiona kaj landa agado (afrika agado, la Azia Centro, “eŭropa agado” ktp)
- (e) Rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj
- (f) Centro Zamenhof en Bjalistoko
- (g) Junulara agado pere de TEJO
- (ĝ) Delegita Reto kaj servoj al la membroj

353. Kelkaj iom gravaj funkcioj ne aperas en la ĉi-supra listo. Ekzemple mankas financa evoluigo – ne ĉar ĝi ne estas grava, sed ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis difini kaj plenumi tiun taskon adekvate. Mankas ankaŭ informado kaj instruado – denove ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis difini adekvate la rolon de UEA en tiuj agadoj (precipe la unua). Mankas faka agado, ĉar la nivelo de agado flanke de la *centra* UEA malaltas. Mankas parlamenta agado, pro samaj kialoj. Do, ni konstatas la nunan situacion, ne la idealon.

4. FORTOJ KAJ MALFORTOJ: NIA STRATEGIA SITUACIO

41. Se oni zorge analizas la nunan staton de UEA, oni povas konstati certajn apartajn fortojn de la Asocio kaj de ĝia situacio, kaj certajn gravajn malfortojn. Same oni povas konstati, ke UEA havas je sia dispozo certajn ekspluateblajn cirkonstancojn kaj okazojn, kaj ke ĝi frontas certajn gravajn minacojn. Kiam lastatempe la estraranoj de UEA klopodis difini la ĉefajn punktojn en tiuj kvar kategorioj, ili interkonsentis pri la listoj, kiujn ni ĉi tie prezentas kiel la strategian situacion de UEA. Ni devas ekzameni tiun situacion de tempo al tempo kaj klopodi plani nian agadon por ekspluati niajn fortojn kaj minimumigi la efikon de niaj malfortoj.

42. **Fortoj.** La jenaj ses fortoj estas aparte evidentaj en la situacio de UEA:


- (a) La fido kaj lojaleco de la membroj de la Asocio.
- (b) La fakto, ke eblas komunikiĝi kun ĉiuj membroj en ĉiuj partoj de la mondo per unusola lingvo – unikaĵo inter internaciaj organizaĵoj.
- (c) La ekzisto de la landaj asocioj kun iliaj organizaj aparatoj.
- (ĉ) La ekzisto de multaj instruistoj inter la membraro de UEA.
- (d) La fortoco de la junularo esperantista.
- (e) La Universalaj Kongresoj, kiuj fariĝis grava movada institucio.

43. **Malfortoj.** Oni povas difini ses malfortojn de la Asocio, jene:

- (a) Manko de profesieco en la agado por Esperanto: la Asocio tro multe dependas de volontulaj, kaj ofte ne tre kompetentaj aŭ fidindaj, fortoj.
- (b) Manko de lerniloj kaj instruiloj: kompare kun la etnaj lingvoj, la lerniloj por Esperanto estas ofte tre primitivaj aŭ malmmodernaj.
- (c) Mankas taŭgaj integrigaj strukturoj en la Esperanto-movado, eĉ inter UEA kaj la landaj asocioj: la homoj emas iri sian propran vojon, sen integrigo kaj disciplino.
- (ĉ) UEA havas tro malmultajn membrojn: mankas adekvataj homaj rimedoj kaj sufiĉe granda merkato.
- (d) Financaj rimedoj ne sufiĉas.
- (e) Malgraŭ granda progreso ekster Eŭropo, la Asocio restas tro ligita al Eŭropo kaj eŭropaj vidpunktoj.

44. **Ekspluateblaj Okazoj.** Se oni rigardas la situacion de UEA en 1988, oni povas tuj konstati certajn belajn okazojn por plifortigi la Asocion aŭ por altiri atenton al Esperanto:

- (a) Universalaj Kongresoj estas unika ebleco por kapti la intereson de homoj, fortigi la Esperanto-kulturon, instrui Esperanton, kaj prezenti la lingvon al la ekstera publiko.
- (b) La tutmondiĝo de Esperanto malkovras al ni vastajn tavolojn de homaj fortoj (ekzemple en Ĉinio), kies laborkapaciton ni ĝis nun ne sukcesas adekvate eluzi.
- (c) La nun finiĝinta Jubileo de Esperanto, la rezolucio de Unesko, kaj aliaj lastatempaj okazintaĵoj levis ĉe la publiko la profilon de Esperanto kaj donis novan impulson al la esperantistoj; necesas tion ekspluati pli sisteme.
- (ĉ) Turismo kaj la utiligo de Esperanto en tiu medio prezentas unikan okazon por popularigi la lingvon kaj gajni monon.




provo de komuna analizo



tutmondeco: forto kaj defio



La Jubilea informado influis publikan opinion.



La informa revolucio portas
kaj novajn ŝancojn (44d)
kaj minacojn (45d).

La supra analizo formas bazon
de la postaj ĉapitroj.

*Ĉu vi starigus aliajn prioritatojn?
Kiujn?*



(d) La moderna komunika tekniko restas neekspluatata de UEA, sed prezentas novajn perspektivojn por la Asocio (tuja kontaktado kun kunlaborantoj, rapida interŝanĝo de informoj, komputila utiligo de Esperanto, evoluigo de novaj instruiloj kaj instrumentadoj).

(e) La Esperanto-movado ĝenerale, kaj UEA specife, konsistigas internacian komunikan reton utiligeblan por disvastigo de plej diversaj informoj; ni devas pli bone disponigi ĝin al similcelaj organizaĵoj kaj instancoj, kaj pli efike ekspluati ĝin por niaj propraj celoj.

45. Minacoj. La estonteco de la Esperanto-movado kaj de UEA estas minacata de pluraj evoluoj en la ekstera socio kaj ene de la Esperanto-movado mem:

(a) Nesufiĉa scio de Esperanto: multaj esperantistoj restas komencantoj, aŭ nesufiĉe laboras por plibonigi sian lingvoscion. Sen granda nukleo de fluaj uzantoj, Esperanto ne povas daŭrigi sian ekziston.

(b) Manko de interna unueco en la Esperanto-movado: mankas sento de direkto kaj sufiĉa preteco aktive kunlabori.

(c) Troa dependo de la laboro de unuopuloj: manko de kontinueco, kaj de profesieco (vidu ĉi-supre).

(ĉ) Kresko de la forteco de la angla lingvo. Kian rolon havu Esperanto en la internacia vivo?

(d) Rompo de la lingva barilo per moderna tekniko (aŭtomata tradukado; maŝinhelpata tradukado ktp).

(e) La neceso konkurenci kontraŭ aliaj sociaj intereso, ofte financataj per grandaj komercaj investoj – do la manko de adekvataj financaj rimedoj.

46. Surbaze de la ĉi-supraj konstatoj, la Estraro difinis diversajn respondojn al la unuopaj punktoj – agadon por ekspluati niajn fortojn, agadon por kontraŭbatali niajn malfortojn ktp. El tiu procedo ekestis la trajtoj de la ĝenerala strategia plano, kiun ni ĉi tie prezentas. Helpis en ĝia formulado ankaŭ la studo de la Centra Oficejo, kiun faris s-ro G. C. Fighiera en 1987, kaj postaj diskutoj en la Komitato kaj Estraro.

5. PRIORITATOJ

51. Surbaze de ĝiaj celoj kaj de la analizo de ĝia strategia situacio, ni povas starigi ĉefajn prioritatojn por UEA. Ili rilatas al tri ĉefaj terenoj de agado. Krom en la senco de punkto 55, ĉi-sube, ili *ne estas listigitaj laŭ prioritata ordo*.

(a) Disvastigo de Esperanto

(b) Utiligo de Esperanto

(c) Edukado al tutmonda konscio

52. Disvastigo de Esperanto. Ĝi konsistas el du elementoj:

1. Informado pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj

2. Instruado de Esperanto

53. Utiligo de Esperanto. Ĝi enhavas kvin elementojn:

3. Praktika aplikado de Esperanto en ĉiuj sferoj de la homa vivo

4. Riĉigo de la kulturo kaj lingvo de Esperanto kaj konservado de la lingva unueco

5. Klerigo de niaj membroj pri Esperanto

6. Fortigo de la Esperanto-movado laŭnombre kaj laŭkvalite

7. Fortigo de UEA

54. Edukado al Tutmonda Konscio. Kvankam Esperanto estas utiligebla de ĉiuj personoj, UEA ekzistas interalie por fortigi la internacian vivon kaj faciligi la komunikadon en spirito de kunlaboro. Sekve, edukado al tutmonda konscio estas esenca parto de nia tasko – kaj en la Esperanto-movado kaj ekster ĝi. Ĝi havas tri elementojn:

8. Informado pri la celoj kaj idealoj de internaciaj organizaĵoj, precipe UN kaj Unesko.

9. Informado kaj studado pri mondaj demandoj, en kulturo, scienco, ekologio, homaj rajtoj, kaj aliaj.

10. Kontribuo de nia scio pri lingvaj demandoj al la ekstera socio, kaj studado de la teoria kaj praktika bazo de Esperanto kiel solvo de la monda lingva problemo (kio siavice helpas plenumon de la unua prioritato: informado).

55. El tiuj tri ĉefaj prioritatoj kaj dek subdividoj, la unua – informado kaj instruado – estas la ĉefa. Ĉiuj agadoj de UEA devas esti juĝataj laŭ ilia kontribuo al plenumo de la supre listigitaj prioritatoj. Kvankam je la landa, faka k.a. niveloj estos iom da vario, ni invitas aliajn Esperanto-organizaĵojn mezuri la efikecon de sia

agado laŭ tiuj tri prioritatoj: Disvastigo, Utiligo, Edukado al Tutmonda Konscio. Agadoj de UEA, kiuj ne rilatas al la prioritatoj, prefere estu haltigitaj favore al tiuj, kiuj kongruas kun la prioritatoj.

6. FINANCOJ

61. Bazo de la tuta agado de la Asocio estas la financoj. La Asocio devas dediĉi prioritatan atenton al fortigo de la financa bazo. Plenumo de tiu ĉi strategia plano eĉ postulas tion.

62. La Asocio nomos komisiiton aŭ estraranon pri financa evoluigo. Tiu persono proksime kunlaboros kun la Ĝenerala Direktoro, kiu metos la akiron de mono inter siajn ĉefajn zorgojn. Tiu teamo celos i.a.

(a) Fortigi kaj pligrandigi la Societon Zamenhof.

(b) Identigi malgrandan grupon de potenciale grandaj mecenatoj kaj kunlabori kun ili por trovi vojojn, per kiuj ili pretos kontribui.

(c) Organizati ĉiujaran kampanjon por akiri donacojn de membroj, utiligante ne nur poŝtajn sed ankaŭ telefonajn kaj personajn kontaktojn.

(ĉ) Pretigi materialon pri testamentado de mono al UEA kaj ĝin distribui.

(d) Ligi la Institucion Hodler al tiu ĉi agado.

63. La Asocio buĝetos ĉiujare taŭgan sumon por subteni la evoluigan agadon.

64. La Asocio esploros starigon de Turisma Fakoj de UEA. Intertempe, la Konstanta Kongresa Sekretario respondecos pri organizado de enspezigaj turismaj agadoj aldone al la Universalaj Kongresoj.

65. La Universalaj Kongresoj restos grandaj, ĝeneralaj aranĝoj. La Asocio klopodos varbi kiel kongresanojn ankaŭ lernantojn de Esperanto, familianojn, kaj aliajn grupojn nun ofte neglektatajn, kaj pretigos specialajn programerojn por ili.

66. La Asocio donos al sia librovendado pli komercan bazon, pli vaste kaj energie reklamante la librojn kaj serĉante klientojn ankaŭ ekster la Esperanto-movado.

67. La Asocio esploros kun la landaj asocioj vojojn al pli intensa kunlaboro, cele al reciproka redukto de kostoj kaj pliefikigo de la agado.

68. La Asocio esploros vojojn al akiro de subvencioj kaj aliaj formoj de subteno flanke de la urbo Rotterdam, la nederlanda ŝtato, kaj la Eŭropa Komunumo.

69. La Asocio intensigos siajn klopodojn akiri reklamojn por siaj eldonaĵoj.

7. ORGANIZAĴOJ

71. **Junularo.** UEA kunlaboros kun TEJO pri realigo de ties laborplano, precipe koncerne la instruadon de Esperanto kaj kulturan agadon.

72. Landaj Asocioj

721. La Asocio nomos komisiiton aŭ oficiston kun specifa respondeco pri landa agado.

722. Tiu persono respondecos pri kunordigo de landaj asocioj por faciligi ilian kunlaboron kaj la kunlaboron inter LA kaj UEA.

723. Tiu kunlaboro povus celi komunajn eldonajn projektojn, evoluigon de lerniloj kaj instruiloj, komunan informan agadon inter samlingvaj LA-oj, edukadon de gvidantoj, eldonon de komunaj gazetoj, komunan membroadministradon, ktp.

724. UEA kunvokos la administrantojn aŭ gvidantojn de LA de tempo al tempo, ekzemple laŭ regiona aŭ lingva bazo, por plani kunlaboron.

73. Fakaj Asocioj

731. UEA proponos servojn (kontraŭ pago) al la fakaj asocioj por faciligi ilian membroadministradon, eldonadon de informiloj ktp, kaj tiel ebligante al ili koncentri siajn fortojn je aliaj agadoj ol simple plenumi la propran mastrumadon.

732. UEA fortigos siajn rilatojn kun ILEI, kiu restos ĝia ĉefa konsilanto kaj plenumanto sur la tereno de instruado de Esperanto. La du organizaĵoj ellaboros komunan agadplanon kaj UEA buĝetos specifan sumon por akceli la evoluon de bonaj lerniloj por Esperanto.

733. En tiuj terenoj kie nun mankas fakaj asocioj, sed kie ili estas bezonataj, UEA iniciatos agadon cele al ilia starigo. Ĝi klopodos interkontaktigi membrojn, kiuj havas samajn interesojn, kaj stimulos ilian kunlaboron.

74. Aliaj Esperanto-Instancoj

741. UEA stimulos la kunlaboron de aliaj Esperanto-institucioj per kunvenigo de reprezentantoj de similcelaj instancoj de tempo al tempo (ekzemple: de eldonejoj, de redaktoroj de Esperanto-gazetoj, de bibliotekistoj, de homoj kiuj okupiĝas pri bibliografio, de terminologoj, de universitatoj), kaj per aliaj rimedoj.

Ĉapitroj 6-9 estas kontrolindaj laŭ la kriterioj starigitaj en ĉapitroj 1-5.




utiligo de telefonaj ebloj

Vidu subĉapitron 92.


Vidu ekz. subĉapitrojn 85-87.

Vidu subĉapitron 72.

Kiun rolon en la kunlaboro havu la Komitatanoj A (subĉapitro 83)?



pli granda kontaktiga rolo de UEA (subĉapitroj 72, 73, 74)



Vidu ankaŭ subĉapitron 91.

pere de la Informa Fako?
(subĉapitro 816)

rolo de la Ĝenerala Direktoro:
gvida kaj kunordiga pri
(sub)ĉapitroj 9, 6, 5, 82, 83
kaj 7, laŭvice

Direktoro de la Centra Oficejo:
implice respondeca, parte aŭ tute,
pri plenumo de 72, 73, 81, 85,
87, 88, 89, 91, 93 kaj 96

*Kiuj estas la implico de la
nuna Plano por la konsisto de
la Oficejo? Kiujn prioritatojn
doni al la stabo? Kiujn al la
aliaj "homaj rimedoj"?*



Ankaŭ la Estraro regule planos.

esenca rolo de la Komitato
en elekto de la Estraro

742. Per la Terminologia Esperanto-Centro la Asocio klopodos kunordigi la terminologian laboron kaj la evoluigon de la Esperanto-terminaro.

743. UEA instigos la diversajn sendependajn Esperanto-instancojn subskribi kun ĝi kontraktojn pri kunlaboro, kie taŭge.

744. UEA aparte okupiĝos pri kunordigo de la eldona agado en la Esperanto-movado, por iom pli sisteme certigi la aperigon de certaj kategorioj de libroj, interalie vortaroj, lernolibroj, konsultolibroj kaj aliaj bazaj bezonaĵoj, kaj ankaŭ sciencaj verkoj.

745. UEA daŭrigos sian subtenon de la laboro de la Akademio de Esperanto.

75. Similcelaj Organizaĵoj

751. UEA ligos kontaktojn kun similcelaj organizaĵoj cele al pli intensa kunlaboro, organizado de komunaj renkontiĝoj, plifirmigo de ilia konvinkiĝo pri Esperanto ktp.

752. Kie taŭge, UEA subskribos kontraktojn kun similcelaj organizaĵoj.

753. UEA intensigos sian informadon al similcelaj organizaĵoj, kaj instigos la landajn kaj fakajn asociojn fari same.

8. HOMAJ RIMEDOJ

81. Stabanoj kaj Oficistoj

811. La politiko de UEA, laŭ kiu la Asocio starigis novajn oficejojn en diversaj mondpartoj, esence ŝanĝiĝis: la Budapeŝta Oficejo fermiĝis; Grafika Centro Antverpeno sendependiĝis; la Novjorka Oficejo ne plu havas salajratan direktoron. Koncentriĝis la diversaj agadoj denove en Roterdamo, kvankam ni ja povas antaŭvidi plian evoluon de la azia agado.

812. Pro tiu koncentriĝo, la iam antaŭvidata rolo de la Ĝenerala Direktoro – kunordiganto de la diversaj administraj unuoj de UEA – malaktualiĝis.

813. Aliflanke, la Ĝenerala Direktoro alprenis novan esencan rolon, kiel kunordiganto de la laboro de la Estraro kaj Komitato kaj kiel reprezentanto de la Asocio ĉe eksteraj instancoj. Ni daŭrigos laŭ tiu vojo. La ĉefaj taskoj de la Ĝenerala Direktoro estos: respondi antaŭ la Estraro pri la ĝeneralaj operacioj de la Asocio, respondi pri la financa evoluigo de la Asocio, gvidi la strategian planadon, kunordigi la laboron de la Estraro kaj Komitato, kaj teni superrigardon de kunlaboro inter UEA kaj ĝiaj landaj kaj fakaj asocioj.

814. La direktoro de la Centra Oficejo respondecos antaŭ la Ĝenerala Direktoro pri la administrado de la Asocio, la funkciado de la servoj, kaj la ĝenerala agado de la Centra Oficejo.

815. La funkciojn kaj agadon de la diversaj oficistoj de la Asocio kondiĉigos tiu ĉi Strategia Plano: same kiel ĉe la diversaj laboroj de la Asocio, la ĉefa kriterio por dungo kaj salajrado de oficisto estos ties kontribuo al la prioritatoj de la Asocio, tiaj kiaj ili estas difinitaj en la Plano.

816. Pro tio, ke informado estas ĉefa prioritato de la Asocio, UEA restarigos sian Informan Fakon, kaj oficisto de la CO estos aparte ŝarĝita pri tiu tasko. Tiu persono laboros laŭ detala laborplano. Unu el liaj/ŝiaj ĉefaj taskoj estos kunlaboro en la informa agado je landa nivelo, kaj kunlaboro kun TEJO en ties informservo (starigota laŭ la laborplano de TEJO).

817. La Volontula Servo restos esenca elemento en la laboro de la Centra Oficejo. UEA klopodos pli intime ligi iamajn Volontulojn al la laboro de la Asocio kaj de la landaj kaj fakaj asocioj, por ne perdi iliajn spertojn.

82. Estraranoj


821. Laŭ la ĝisnuna politiko, kaj ĉefe pro manko de homaj fortoj en la Centra Oficejo, en certaj fakoj la Estraro ne nur faradas la plenumajn *decidojn* sed ofte ankaŭ la pluman *agadon*: pluraj Estraraj funkcioj estas plenumataj preskaŭ sen la interveno de la profesiaj oficistoj de la Asocio. Unuopaj estraranoj ofte fiksas siajn proprajn prioritatojn kaj eĉ la direkton de la laboro. Se tiuj estraranoj pro iu kialo paneas, paneas ankaŭ la koncerna fako.

822. La Estraro ekde nun laboros surbaze de klare formulita kaj interkonsentita plano, pretigita de la Ĝenerala Direktoro komence de la deĵora jaro, akceptita de la Estraro, kaj transdonita porinforme al la Komitato. Ĝi fiksos la taskojn de la unuopaj estraranoj. La Ĝenerala Direktoro helpas laŭnecese se difinitaj laboroj aŭ fakoj ne ricevas sufiĉan atenton. La Prezidanto raportos al la Komitato pri ŝanĝoj aŭ eventualaj neplenumoj de la plano.

823. Elektante la Estraron, la Komitato zorge selektos nur tiujn personojn, kiuj alportas ion gravan per sia estraraneco: laborpretecon, influajn kontaktojn, socian

882. UEA dediĉos apartan atenton al la bezonoj de esperantistaj infanoj, kaj al la infanoj de esperantistoj, per aperigo de gepatraj konsilaroj kaj taŭgaj eldonaĵoj, aranĝado de specialaj dumkongresaj programeroj, ktp. Ĝi interkonsiliĝos kun ILEI kaj TEJO pri tiu ĉi temo.

pere de la Informa Fako?
(subĉapitro 816)



Kiajn verkojn vi atendas
de UEA?

Ĉu konsiloj de aliaj movadaj
eldonejoj?



Ĉu ankaŭ la UK uzeblus tiucele?



89. Simpatiantoj

891. UEA pretigos nacilingvan materialon por liveri al celgrupoj de simpatiantoj, inkluzive anoncojn pri novaj lernolibroj k.s. Ĝi starigos apartan liston de simpatiantoj en sia komputilo en Roterdamo kaj liveros al ili informojn de tempo al tempo.

892. La Asocio klopodos identigi kelkajn simpatiantojn, kiuj eventuale pretos fariĝi mecenatoj de la Asocio.

9. ORGANOJ KAJ AGADOJ

91. Eldonado

911. La revuo *Esperanto* estas la ĉefa movada organo. Kvankam ĝi devas iagrade konservi tiun superrigardan karakteron, ĝi estontece pli klare prezentos ĝisdatan bildon de la efektiva laboro de UEA kaj ĝiaj konsistigaj asocioj, kiu stimulos la membrojn al agado kaj donos pli klaran impreson pri engaĝita asocio. La redaktoro tenos pli proksimajn rilatojn kun la LA kaj FA kaj helpos en la organiza laboro.

912. UEA pli klopodos redukti la kostojn de la revuo kaj altigi ĝiajn enspezojn.

913. UEA reekzamenos la eldonadon de *Kontakto* cele al egaligo de ĝiaj spezoj.

914. UEA daŭrigos eldonadon de *Esperanto-Dokumentoj* sed klopodos pli sisteme plani la serion kaj pli sisteme vendi la dokumentojn (ankaŭ kvante al LA), varbi anoncojn, kaj de tempo al tempo kolekti la dokumentojn libroforme.

915. La Asocio klopodos redukti la netajn eldonkostojn de la Jarlibro. Ĝi esploros aldonon de kelkpaĝaj klarigoj en la komenco de la libro en naciaj lingvoj, cele al vendo de la verko al bibliotekoj, ekzemple en Nederlando kaj najbaraj landoj.

916. La Asocio daŭrigos sian eldonan agadon, koncentrante siajn fortojn je konsultolibroj, lerniloj, terminaroj kaj sciencaj verkoj, helpiloj al organizantoj, facilaj legaĵoj ktp.

917. La Asocio esploros la buĝetadon de la Eldona Fako, cele al pliklarigo de la efektivaj kostoj kaj enspezoj.

918. UEA esploros lanĉon de serio de tradukoj de modernaj literaturaj verkoj, paralele al la Serio Oriento-Okcidento, kaj laŭ apartaj interkonsentoj kun la verkintoj, ke ili rezignu pri sia tantiemo favore al Esperanto.

919. La Asocio eldonos pli da nelibra materialo: sonmaterialo (i.a. prononc-kasedoj), videomaterialo ktp. Ĝi faros apartajn klopodojn liveri tian materialon al izolitaj esperantistoj kaj Esperanto-movadoj, ekzemple en la Tria Mondo, kie mankas eblecoj aŭdi la parolatan lingvon.

92. Kongresoj

921. La Universalaj Kongresoj restos grandaj kulturaj manifestacioj de la Esperanto-movado. UEA celos plivastigi la klientaron por la UK, farante specialajn aranĝojn por komencantoj, familiaj membroj kaj aliaj iom neglektataj grupoj, kaj planante la programon kun klara konscio pri la diverseco de la traktataj grupoj.

922. La UK estas unika okazo por ekstera informado. Tio ricevos prioritatan atenton en la preparlaboro por estontaj kongresoj.

923. La UK estas ĉefa elmontrejo kaj instigilo de la Esperanto-kulturo. UEA daŭrigos siajn klopodojn prezenti la plej bonajn aspektojn de la Esperanto-kulturo en la UK kaj stimuli novan talenton.

924. Dum la jaro UEA organizos ankaŭ aliajn malpli grandajn konferencojn, seminariojn ktp, precipe je regiona nivelo, eventuale en kunlaboro kun LA kaj FA. Ĝi aparte atentus la neceson plifortigi la organizan kapablon de aktivuloj, plialtigi la lingvan nivelon, kaj pretigi instruantojn de Esperanto.

93. Esploro kaj Dokumentado

931. La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) daŭrigos eldonon de la revuo *LPLP (Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado)* sed elserĉos eldonejon pli firme ligitan al la faka medio de lingvistiko. CED/UEA intensigos la varbadon de individuaj kaj bibliotekaj abonoj.

932. UEA starigos apartan buĝeton por la Biblioteko Hodler. Ĝi nomos bibliotekiston (eventuale kontraŭ honorario). Ĝi plibonigos la fizikan situacion de la Biblioteko, faciligos ĝian utiligon, kaj sisteme klopodos kreskigi la kolekton.

933. CED daŭrigos la Esperantologiajn Konferencojn kaj aliajn siajn aranĝojn kaj klopodos vastigi sian rolon kaj situacion inter eksterstarantaj lingvistikaj k.s. organizaĵoj kaj institucioj.

94. Eksteraj Rilatoj

941. UEA intensigos sian informan laboron ĉe UN kaj Unesko, prefere per kunordigo de agado inter Novjorko kaj Parizo kaj eventuale per dungo de oficisto aŭ en

Novjorko aŭ en Parizo. Ĝi ellaboros planon por pli bone fokusigi sian agadon kaj por fiksi specifajn celojn lititajn al la Strategia Plano.

942. UEA nomos komisiiton pri Parlamenta Agado kaj donos al tiu persono malgrandan buĝeton, tiel ke la Asocio povu ekspluati la nuntempe aparte favorajn kondiĉojn sur tiu tereno.

943. La Asocio ellaboros laborplanon por la rilatoj kun neregistaraj kaj aliaj registaraj organizaĵoj. Ĝi donos apartan atenton al la Monda Organizaĵo pri Turismo. Ĝi celos pli sisteme kaj kun pli limigita fokuso direkti siajn energiojn sur tiu ĉi tereno, kaj kunlaboros proksime kun TEJO kaj ILEI.

944. Esenca parto de la ekstera politiko de la Asocio devas esti pli proksima kunlaboro kun sciencaj kaj teknikaj fakaj organizaĵoj ekster la Esperanto-movado. UEA ellaboros tiucelan laborplanon.

95. Regiona kaj Landa Agado

951. En suda kaj orienta Azio, la Asocio laboros por starigi kunordigan agadon, kiu helpu la landajn movadojn en tiu regiono plialtigi la lingvan nivelon de la membroj, plifortigi sian organizan kapablon, kaj engaĝiĝi en la internacian Esperanto-movadon. UEA ellaboros detalan laborplanon tiucele.

952. En Afriko la Asocio daŭrigos sian agadon por ligi la tieajn esperantistojn kun la internacia movado kaj liveri lernilojn al tiuj, kiuj deziras lerni kaj instrui la lingvon.

953. La Asocio aparte utiligos la antaŭvidon, ke la UK de 1990 okazos en Latinameriko, por intensigi la agadon en tuta Latinameriko, kunlabore kun la tieaj esperantistoj.

954. La Asocio laboros por restarigi la agadon de la Eŭropa Esperanto-Centro, intensigi la kunlaboron inter okcidenteŭropaj landaj asocioj, kaj trovi vojojn al kunlaboro kun la instancoj de la Eŭropa Komunumo.

955. La Asocio interkonsiliĝos kun la orienteŭropaj landaj asocioj por pli bone difini iliajn bezonojn, problemojn kaj perspektivojn, cele al evoluigo de pli detala strategio por tiu regiono.

956. UEA kunlaboros kun TEJO en ties planoj por ligi eŭropajn landajn sekciojn kun junaj esperantistoj en evoluantaj landoj.

96. Centro Zamenhof

961. La Asocio donos prioritatan atenton al kunlaboro en la organiza komitato de la proponata Centro Zamenhof en Bjalistoko. Ĝi proksime kunlaboros tiucele kun la polaj Esperanto-organizaĵoj kaj interkonsiliĝos kun CED, TEJO, ILEI kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj.

962. La Asocio ellaboros detalajn proponojn koncerne sian rolon en la programoj de la Centro kaj la financado de tiuj programoj, kaj starigos la necesajn organizajn kaj administrajn strukturojn tiucele.

97. Delegita Reto kaj Servoj

971. La unua kaj ĉefa celo de la servoj de la Asocio devas esti pliaktivigo de la membraro kaj ilia pliefikigo kiel aktivaj esperantistoj. La funkciado de la nunaj servoj kaj aldono de novaj devas esti konsiderataj ĉiam en tiu kunteksto.

10. KONKLUDO

101. La plenumado de tiu ĉi Strategia Plano postulos grandan fortostreĉon. Necesos pli da financaj rimedoj. Necesos pli granda sindediĉo de niaj kunlaborantoj. Necesos iom severa rekonsidero de kelkaj niaj ĝisnunaj agadoj. Se ni efektive deziras ĝeneraligi kaj sukcesigi Esperanton en la dua jarcento de ĝia ekzisto, ni devas esti pretaj draste pligrandigi la rimedojn disponeblajn al la Asocio. Tion ni faros ĉefe per la jenaj paŝoj:

- (a) intensa laboro por varbi donacojn, novajn membrojn ktp.
- (b) pli bona vendado de niaj servoj
- (c) pligrandigo de niaj homaj rimedoj
- (ĉ) pliperfektigo de la ekzistantaj homaj rimedoj
- (d) pli racia utiligo de niaj homfortoj
- (e) preteco trovi por ĉiu laborpreta homo niĉon en la strukturo.

Tiuj, kiuj ne havas tempon aŭ energion por granda kunlaboro, trovu sian lokon ie en la strukturo; tiuj, kiuj pretas labori pli, proponu sin. Tiuj, kiuj pretas finance subteni la laboron, konsiliĝu kun la Asocio por trovi la plej efikan manieron tion fari. Tiel, finfine, ni utiligos ĝis maksimumo niajn fortojn kaj, per saĝa investo, ilin pligrandigos.




laborplanoj verkotaj pri
eksteraj rilatoj...

... faka agado ...

kaj regiona agado:

- Azio
- Afriko
- Latinameriko
- Okcidenta Eŭropo
- Orienta Eŭropo
- pere de TEJO.



Vidu ekz. *Esperanto* 1988/p. 81.

Vidu subĉapitron 85.

finaj demandoj:

*Ĉu la Plano respondas al la
prioritatoj skizitaj en ĉapitro 5?
Ĉu ĝi kongruas kun la analizo en
ĉapitro 4? Ĉu kun viaj propraj
atendoj? Ĉu ĝi traktas ĉion
traktendan?*


Ĉi-jare, tri kongreslandanoj

En Roterdamo la Komitato de UEA daŭrigis la belan kutimon, distingi plurajn elstarajn esperantistojn elektante ilin al la Honora Patro Komitato aŭ Honora Membraro. Jen koncizaj biografioj de la ĉi-jaraj honoritoj.

Dalibor Brozović, la nova membro de la Honora Patro Komitato, naskiĝis en 1927 en Sarajevo, Jugoslavio, kaj de 1967 estas regula profesoro ĉe la Universitato de Split. Li estas nuntempe unu el la gvidaj slavistoj en la mondo, redakciano interalie de la *Tutslava lingva atlaso* (Moskvo) kaj la *Eŭropa lingva atlaso* (Nederlando), aŭtoro de du libroj kaj pli ol 350 fakaj studoj, membro de la Jugoslavia kaj Makedonia Akademioj de Sciencoj. Prof. Brozović sendube troviĝas inter la plej elstaraj lingvistoj, kiuj aktive okupiĝas pri Esperanto; ankaŭ tiu okupiĝo estis neordinare fruktodona. De kiam li eklernis la lingvon en 1947, li verkis originalan poezion, multe tradukis (i.a. en *Kroatia poezio* kaj *Makedona antologio*), verkis originalajn artikolojn pri la makedona lingvo kaj literaturo, kaj kontribuis al la esperantologio (inkluzive de la klasika studo "Pozicio de Esperanto en lingva tipologio"). Li nun preparas krestomation de jugoslavia interlingvistiko.

István Bácskai (1908), hungaro, emerita fervoja administristo kaj edukisto, aktivas en la movado de 1945. Unuflanke li multe kontribuis al la landa movado, estante en diversaj periodoj komitatano, prezidiano kaj vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, redakciano de *Hungara esperantisto* kaj *Hungara vivo*. La budapeŝtaj Universalaj Kongresoj en 1966 kaj 1983 enplektis ankaŭ lin en la organizan laboron. Aliflanke, d-ro Bácskai centre rolis en la funkciigo de la plej granda Esperanta fak-organizaĵo, IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio). En 1957 li fondis ties tre aktivan hungaran sekcion, kies organon *Hungara fervojista mondo* li redaktis dum 17 jaroj. Li iniciatis kaj realigis ankaŭ fervojan terminaron hungaran-Esperantan, kaj Esperantan klarigan tekston en la oficialaj horarlibroj de Hungaraj Ŝtataj Fervojoj. IFEF-on li reprezentis en la Komitato de UEA dum 17 jaroj.


Oene Hoekstra (1923), nederlandano, instruisto, ekkonis Esperanton jam en 1935 kaj du jarojn poste persvadis sian lernejon starigi kurson. Tio estis la unua paŝo en duon-jarcento da agado por pli vasta kaj efika instruado de Esperanto. Kiel la prezidanto de loka klubo, estrarano kaj prezidanto de la nederlanda ILEI-sekcio, administranto de la korespondaj kursoj laŭ *Esperanto programita*, multfoja gvidanto de vesperaj, lerneja kaj universitataj kursoj, li faris elstaran praktikan kontribuon al la nederlanda Esperanto-movado. En 1977 li kunordigis la Lernejan Semajnon en St. Gerard, Belgio, unika eksperimento kiu kunvenigis 166 infanojn el 5 landoj. De 1982 li okupiĝas, kune kun unu-du kolegoj, pri la ellaboro de nova metodo por pli efika lingvo-lernado, la "Esplor-kreiva vojo". Tiun sistemon li jam prezentis al studgrupoj de instruistoj en Nederlando, Belgio kaj Germana DR, kaj ankaŭ ĉe la ĉi-jaraj ILEI- kaj Universala Kongresoj. S-ro Hoekstra krome restas unu el la plej regulaj kontribuantoj al la diversaj UEA-fondaĵoj, inkluzive de la pago de kotizoj por kelkaj triamondaj movadanoj.



Gustav Kühlmann (1912), dano, lignaĵisto, estas modelo de tia persista loka aktivulo, kiu vivtenis la Esperanto-movadon tra ĉiuj malfacilaĵoj, krizoj kaj militoj en ĝia historio. Lerninte la lingvon en la tridekaj jaroj, en 1938 li fariĝis prezidanto de Kopenhaga Esperanto-Klubo kaj restis en tiu posteno ĝis hodiaŭ. Dum multaj jaroj li estis komitatano de UEA, kaj organizis ĉiujarajn kongresvojaĝojn al la Universalaj Kongresoj. En 1948 li organizis la postkongreson post la UK en Malmö, kaj en 1956 la 41-an UK en Kopenhago, sed tiuj du spertoj nur prologis lian plej dramatan intervenon: Kiam, ĉe la UK en Hamburgo en 1974, UEA frontis mankon de kongresurbo por la sekva jaro, s-ro Kühlmann ekstaris en la Fermo por deklari, ke Kopenhago denove surprenos tiun respondecon. Tiu preteco al sinofero markas lian tutvivan agadon por Esperanto.

G. F. Makkink (1907), nederlandano, emerita biologo, esperantistiĝis antaŭ pli ol 60 jaroj kaj multe aktivis por disvastigi Esperanton en sciencaj rondoj. Li kunfondis la nederlandan sekcion de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kaj estis kelkajn jarojn kunredaktoro de *Scienca revuo*. Al siaj sciencaj studoj li ofte aldonis Esperantajn resumojn. Li prelegis diverslande, en la nederlanda, la angla kaj Esperanto, pri la internacia lingvo-problemo, kaj aperigis multegajn artikolojn en nederlandaj kaj aliaj gazetoj. Okaze de la Jubileo aperis lia modele konciza kaj trafa informverko, *Esperanto honderd jaar* (Esperanto centjara). D-ro Makkink estas malnova kunlaboranto de CED kaj verkis plurajn esperantologiajn studojn, el kiuj la lasta, "Pri la artikolo en Esperanto", aperis en *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, vol. 2 (1987). Li krome okupiĝis pri tradukado de la nederlanda poezio, kaj grave kontribuis al *Nederlanda antologio* (1987).

Adriana J. Middelkoop (1913), nederlandano, troviĝas inter la relative malmultaj docentoj pri Esperanto en la movada historio. Ŝi lekciis pri ĝi ĉe la Universitato de



Ĉe la flankoj, I. Bácskai kaj A. J. Middelkoop akceptas gratulojn en Roterdamo; inter ili, pli pasportecaj fotoj de O. Hoekstra, G. Kühlmann (maldekstre) kaj G. F. Makkink (supre). Bildo de prof. Brozović mankas al nia arkivo.

Amsterdamo dum plenaj dek jaroj. Lerninte la lingvon en la tridekaj jaroj, ŝi aktivis je loka nivelo, ekde ĉ. 1965 en la ekzamena komisiono, kaj dum 15 jaroj en la estraro de Nederlanda Esperanto-Asocio. Ŝi krome membris en la ŝtata komisiono por la ekzamenoj pri instrukapableco. Inter 1969 kaj 1985 ŝi okupis sin pri la verkado de pli ol 400-paĝa dudirekta *Nederlanda-Esperanta vortaro*, kies unua eldono aperis en 1971 ĉe prestiĝa eldonejo kaj kies dua, reviziita eldono (1986) jam atingis la unuan represon. Tiu multe laŭdata laboraĵo restas universale uzata en la nederlanda kaj flandra movadoj.

DU NOVULOJ EN LA CENTRA OFICEJO

Du novaj homoj eklaboris en la Centra Oficejo dum lastaj monatoj, kompletigante 11-membran stabon.

Roy McCoy, 39-jara eks-usonano, portas al la posteno de kompostisto 13-jaran profesion sperton ĉe la tipografio. Li interesiĝis pri la fako post sia universitata diplomitiĝo, kaj trovis sian unuan postenon en reklam-agentejo. Duan jaron li laboris ĉe libro-kompostejo en Londono, kaj tiam reiris al Usono por fondi propran. Li serioziĝis pri la ideo de lingvo internacia en 1982, post korusa turneo de Japanio kaj Ĉinio dum kiu li konstatis la malfacilecon de la angla por orientanoj. Poste li magistriĝis pri la hispana cele al profesia instruistiĝo, kaj estis survoje al prifranca magistriĝo kiam oni invitis lin al Roterdamo.

La nova Konstanta Kongresa Sekretario, 31-jara jugoslavo **Nikola Rašić**, aperas aliloke ĉi-numere kiel la LKK-prezidanto por la 44-a Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo (p. 166). De post 1975 li aktivis enlande kaj internacie, jen pri organizado, jen pri edukado (dufoje instruante ĉe la Somera Kursaro en Sanfrancisko, Usono), jen pri verkado kaj tradukado. Sian doktoran tezon ĉe la Universitato de Zagrebo li uzis por fari sociologian studon pri la Esperanto-movado, kiu eldoniĝos venontjare.

LINGVO

Kion signifas nomo? ...

Reagoj al la julia lingvo-rubriko

Konfirmiĝis unu ŝablona impresado de la movado: pri lingvaj demandoj vekas pli da pasio ol iu ajn alia temo. Eble ĉi-foje ni ne eniru analizon de tio, sed simple resumu la diversajn sintenojn esprimatajn pri la artikoloj de Ŝiger kaj Gishron.

Carlo Gazzelli (Italio) "absolute ne povas konsenti" pri la enkonduko de "nenaturaj" esprimoj (ĉi-kaze: numeraj nomoj por tagoj kaj monatoj), ĉar Esperanto estas laŭ li "aposteriora" (t.e. naturalisma) lingvo. Male, **Rio Grande Valley Esperantistaro** (Usono) entuziasmas pri la propono: sep anoj subskribe deklaras sian apogon. Numeraj nomoj plaĉas ankaŭ al **H. O. Woelk** (FR Germanio), dum **Georgo Kamaĉo** (Hispanio) kaj **Anna Ritamäki** (Finnlando) en kuna artikolo proponas eĉ apartajn sufiksojn (anstataŭ la proponitaj *-at-* kaj *-sem-*): *-es-* por la tagoj (*unueso*, *dueso* . . .) laŭ la hispana *lunes*, *martes* ktp, *-ajr-* por la monatoj (*unuajro*, *duajro* . . .), tiel ke naskiĝtago povu nomiĝi *naskeso*, la 15-a de decembro *Zamenhofeso* ktp. Numerajn nomojn aprobas ankaŭ **Paul Tournon** (Francio), kiu ne tiel konsentas pri la literaj nomoj de Gishron: Ĉar "oni ne povas krei pliajn novajn vortojn por plenumi tiun ideon," li preferus liston de dusilabaj jam ekzistantaj vortoj.

Ĝuste tion ne volas **Olaf Reiersol** (Norvegio), kiu por matematikaj bezonoj postulas kiel eble plej da malsimileco inter la literaj nomoj kaj aliaj vortoj, aŭ eĉ literoj en aliaj alfabetoj kiujn oni tamen ofte uzas (ekz. grekaj *alfa* kaj *beto*). Samopinias **Hartmut Traummüller** (Svedio): Surbaze de analizo de la diversaj sonoj indikitaj de la literoj, li proponas skemon de maksimuma klareco, similan al siatempa projekto de **Albault** (*Scienca revuo* 17, p. 37-42, 1966): *a, bol, ce, ĉi, del, e, of, gal, ĝil, haŝ, ah, i, jaj, ĵi, ka, ul, om, en, o, po, er, es, iŝ, te, u, ŭaŭ, vo, ze*. Tiuj nomoj estus radikoj, al kiuj aldoneblus *-o* aŭ alia finaĵo kaze de bezono – sed li agnoskas ke kelkaj jam ekzistas kun alia signifo. Tio ne ĝenus d-ron Woelk, kiu citas la germanan uzon de propraj nomoj por literumado: *Anton, Berta, Caesar* ktp; nek al **Wouter Pilger** (Nederlando), kiu tradukas kelkajn memorojn el la antaŭlernejo jene: *d, dikulo; o, okulo; s, serpento; t, tablo* . . . kaj referencas al Karolo Piĉ por pliaj sugestoj.

Tiu ĉi revuo ne hastos enkonduki iun aŭ alian sistemon apud la tradiciajn, sed la diskuto ne ŝajnas tute neglektinda: multaj movadanoj evidente aprobas plisistemigon de Esperanto. Se la ideologio de la movado evoluos al forta konscio pri lingvo-diferencoj kaj pri la politiko de lingvo-uzo (kiun jam metis en la socian tagordon la inisma movado, precipe), ĉi tiaj ŝanĝoj nature sekvos. Kaj estas neniu malhelpo, ke intertempe, tuj, konvinkitoj ekuzu novajn formojn private kaj publike, provu varbi kunuzantojn, eksperimentu en revuoj kaj leteroj. Nur tiel oni vere ekscios, ĉu ili funkcias aŭ ne en la komunumo.

mf

Venontnumere: Ĉu redifini transitivecon?

Laste aperis...

Angla antologio. Dua parto, 1800-1960. Div. tradukintoj, red. Albert Goodheir, kun enkonduko de Marjorie Boulton. Londono: Esperanto-Asocio de Britio, 1987. 432p. 22cm. Poemoj kaj prozo de pli ol kvindek el la plej konataj anglaj literaturistoj. 34,50 gld.

Antologio de la hebrea poezio. Trad. kaj komp. J. Kohen-Cedek. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo en Israelo, 1987. 268p. 24cm. Poemoj kaj kantoj de la bibliaj tempoj ĝis hodiaŭ. 30,00 gld.

Aŭstralia antologio. Div. tradukintoj, red. Alan Towsey. Pizo: Edistudio, 1988. 431p. 21cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 24. ISBN 88-7036-036-3. Zorge kunmetita trarigardo de la poemoj, kantoj, noveloj, romanoj kaj eseoj de Aŭstralio, kun biografiaj detaloj kaj glosoj, en tre bela eldona vesto. 75,00 gld.

Bitch of Buchenwald, The. Julius Balbin, el Esperanto trad. Charlz Rizzuto, kun enkonduko de William Auld. New York: Cross-Cultural Communications, 1986. 48p. 21cm. Holocaust Series, Chapbook 1. ISBN 0-89304-301-X. Poemoj bazitaj sur memoroj de travivintoj pri la naziaj koncentrejoj. 10,20 gld.

Brulo kaj ritmo. Antonio Agostinho Neto, el la portugala trad. Lutumba Tima. Enkonduko de Biserka Cvjetičanin. Zagreb/Lelystad: Internacia Kultura Servo kunlabore kun Vulpo-Libro, 1987. 116p. 21cm. ISBN 90-70074-34-6. Poemoj de la fondinto de sendependa Angolo, kiuj grave kontribuis al "malkovro de la afrika identeco" dum la liberiga milito. 12,00 gld.

Ĉinaj tradiciaj festoj. Ĉji Ŝing. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 124p. 18cm. Ilus. Serio "Feniksa Libraro". Detala priskribo de la deveno kaj evoluo, kutimoj kaj moroj de la ĉefaj etnaj festoj en Ĉinio. 3,90 gld.

Danĝera lingvo, La. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins (1943-). Gerlingen: Bleicher-Eldonejo, 1988. 546p. 19cm. Ilus. ISBN 3-88350-505-6. Detale dokumentita historio de la atakoj kontraŭ kaj subpremo de la Esperanto-movado, precipe sub la reĝimoj de Hitler kaj Stalin sed ankaŭ en cara Ruslando, en la Ligo de Nacioj kaj en orienta Azio. Esenca legaĵo por iu ajn studanto de la movado. 66,00 gld.

Dresado de la megero, La. William Shakespeare, el la angla trad. Gerald C. Jarvis (1915-1985). Editoris Reto Rossetti. Antaŭparolo de Brian Stone. Roterdamo: Esperantaj Kajeroj n-ro 10, 1988. 136p. 21cm. ISBN 0-9505323-8-X. Mirige freŝa kaj fidela redono de 16a-jarcenta komedio pri geedziĝo, de "la plej klera ŝekspirologo de Esperantujo". 18,00 gld.

Dudek historioj. Div. aŭtoroj, trad. M. Lineckij. Ukraina Respublika Filio de ASE, 1987. 54p. 21cm. Plejparte humuraj rakontoj de famaj sovetiaj verkistoj. Prezo: 6,00 gld.

Dum vi estis kun ni. István Nemere (1940-). Budapest: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 165p. 20cm. ISBN 963-571-244-8. Streĉa detektiva romano ĉirkaŭ la temo de eŭtanazio (laŭpeta mortigo): kio estas krimo, kio ne? 21,00 gld.

Elektitaj artikoloj pri gramatiko kaj retoriko Esperantaj. Div. aŭtoroj. Chongqing: LDE, 1986. 133p. 19cm. Ĉinlingvaj artikoloj, pluraj tradukitaj. Prezo: 5,40 gld.

Esperanta ŝtancila terminaro. Inĝ. Samuilo Mizeruĥa. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo Israela, 1973. 14p. 32cm. Ilus. Zorge ellaborita fakvortareto pri la tekniko de prem-aliformigo. 2,40 gld.

Esperantaj sinonimoj. J. Ojalo. Vilnius/Tallinn/Kaunas: B. Berin, 1985. 80p. 21cm. Mimeo. Indekso. "Projekto" de sinonima vortaro surbaze de PIV. 4,80 gld.


Esperanto-lietuviu ir lietuviu-esperanto kalbu žodynas. K. Puodėnas. Vilnius: Mokslas, 1988. 288p. 22cm. Bind. ISBN 5-420-00387-2. Dudirekta Esperanta-litova vortaro. 21,00 gld.

Esperanto: lingvo, literaturo, movado. Pierre Janton. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 120p. 21cm. ISBN 92-9017-034-4. Scienca kaj tamen populare verkita super-rigardo. 18,00 gld.

Esperanto: nekonata, miskonata. Claude Piron. Paris: Cours et Etudes de Linguistique Contrastive et Appliquée de Vincennes, 1988. 48p. 21cm. Mimeo. Laŭ la sukcesa franclingva inform-verko *Esperanto: l'image et la réalité*, cele al aliaj nacilingvaj versioj; detala, rezona demento de la plej oftaj malfavoraj antaŭjuĝoj. 6,00 gld.

Esperanto vandaag. Red. Paul Peeraerts. Antwerpen: Vlaamse Esperanto-Bond, 1986. 16p. 21cm. ISBN 90-71205-11-8. Konkiza nederlandlingva prezento. 5,40 gld.

Gefährliche Sprache, Die. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Ulrich Lins (1943-). Gerlingen: Bleicher Verlag, 1988. 326p. 19cm. Ilus. ISBN 3-88350-023-2. Konkizigita germana versio de *La danĝera lingvo*. 42,00 gld.



Jubilea rikolto: kvar antologioj el tri kontinentoj.

Granda Meaulnes, La. Alain Fournier (1886-1914), el la franca trad. Roger Bernard. Antaŭparolo de Gaston Waringhien. Rotterdam/La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eldono-presio respektive). 222p. 21cm. Belliteratura serio n-ro 32. Romano pri "la verda paradizo de amoj knabnaivaj"; la ĉefverko de sia aŭtoro. 30,00 gld.

Infoduktoj. Nova vorto, nova futuro. Luc De Brabandere, el la nederlanda traduko trad. BSO-kolektivo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 142p. 21cm. Tabeloj k.s. ISBN 92 9017 038 7. Ali-emfaza rigardo al la komputila revolucio: kiel eblas akordigi ĝin kun la "verda" aŭ alternativa teknologio? 30,00 gld.

Itala antologio. Div. tradukintoj, red. Giordano Azzi. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1987. 477p. 21cm. Ilus. ISBN 88-85872-02-6. Panoramo de la itala literaturo de la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj, zorge komentariita kaj piednotita. 45,00 gld.

Jubileo – jarcento de Esperanto. Div. aŭtoroj, komp. kaj red. Mark Fettes. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 164p. 24cm. Ilus. ISBN 92-9017-040-9. Belaspekta kolekto de artikoloj, raportoj kaj fotoj el la Jubilea Jaro: resumas la etoson-kaj idearon de la movado okaze de ĝia centjariĝo. 57,00 gld.

Kanaano (1901). Graca Aranha (1868-1931), el la portugala trad. Caetano Coutinho. Brasília: Brazila Esperanto-Ligo, 1987. 188p. 21cm. Ilus. Du germanaj enmigrintoj en 19a-jarcenta Brazilo kunportas kontrastajn viv-filozofiojn, kiuj stampas iliajn reagojn al tiu ĉi "promesita lando". 18,00 gld.


Kio estas nun lingvo por internaciaj interŝanĝoj? Tokio: 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, 1988. 74p. 21cm. Dulingva plena raporto de simpozio el 1987, kiu komparas Esperanton kun la lingvoj angla, franca, japana kaj korea, rilate ilian rolon en la komunikado de Japanio kun aliaj landoj. 6,00 gld.

Komunio kun Dio. Bahaaj preĝoj. Wilmette (Usono): Bahá'í Publishing Trust, 1988 (neindikita). 22p. 14cm. 1,50 gld.

Laŭdo de l'stulteco (1511). Erasmo de Roterdamo (1469?-1536), el la latina trad. Gerrit Berveling. Enkonduko de Albert Goodheir. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 112p. 21cm. Ilus. de Hans Holbein la Juna (1497-1543). ISBN 92-9017-039-5. Ŝlosila verko el la eŭropa transiro al humanismo; satira, sprita argumento por la valoro de la homaj pasioj. 30,00 gld.

M. Hernández, poeto de l' popolo. El la hispana trad. Miguel Fernández. Valencia: Grupo Esperanto de Valencia, 1988. 155p. 18cm. ISBN 84-404-2551-1. Reprezenta poemaro de popularega lirikisto, mortinta en 1942 sed inspirinta la junularon de la 60-aj kaj 70-aj jaroj. 15,00 gld.

Muelejoj en Nederlando. C. P. Braay, el la nederlanda trad. Ru Bossong. Zaandam: Kooijman, 1988. 32p. 21cm. Kolorilus. ISBN 90-71816-08-7. Riĉe ilustrita enkonduko. 6,00 gld.



Murdo en Esperantujo. Daniel Moirand. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 172p. 21cm. Serio "Stafeto" n-ro 5. ISBN 90-71205-20-7. Nekonata homo enfalas morta la monatan kunvenon de Esperanto-klubo Rumsheim: ĉu nur hazardo, ĉu io pli minaca...? 21,00 gld.

Ni kaj Ĝi. Gaston Waringhien (1901-). La Laguna: Stafeto, 1973. 346p. 22cm. Belliteratura serio n-ro 30. Erudiciaj kaj elegantaj eseoj pri religio kaj arto, verkitaj en klara kaj alirebla stilo. 45,00 gld.

Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, 7-a eld. Germain Pirlot. Oostende: la kompilinto, 1988. 34p. 21cm. Mimeo. 5,40 gld.

Oktobro kaj la rekonstruo: la revolucio daŭras. Miĥail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1987. 70p. 19cm. Raporto de la sovetia gvidanto okaze de la 70-a datreveno de la Oktobra Revolucio. 3,00 gld.

Parizaj paroladoj de Abdul Baha (1912). El la angla trad. (1932) Lidia Zamenhof. Berno: Nacia Spirita Konsilantaro de la Bahaanoj de Svisujo, 1978 (fotorepreso). 106p. 23cm. Predikoj, meditacoj k.s. de la baha gvidanto. 5,70 gld.

Parolado prononcita de lia prezidenta moŝto Didier Ratsiraka. El la franca trad. Roger Randrianekena. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988 (neindikita). 30p. 21cm. Mimeo. Parolado okaze de la 40-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj (1985), en kiu la madagaskara ŝtatestro pledas por radikala solvo al la vetarmado. 2,40 gld.

DIVERSAĴOJ

Afiŝo: Kubo. 25x30cm. Verda Kubo kaj stelo sur blua terglobo, ĉirkaŭita de homĉeno. Devizo "Ĉiu popolo kun sia lingvo kaj Esperanto por ĉiu" en la hispana kaj Esperanto. 1,50 gld.

Bjalistoka jubilea medalo, granda. bronzaĵo, diametro 12,5 cm. Reliefo de Zamenhof plus tekstoj. 39,00 gld.

Bjalistoko, la urbo de Zamenhof. En la desegnaĵoj de Henryk Wilk. Bjalistoko: Monda Esperanto-Centro, 1988. Enkonduko de Adam Dobroński. 20 desegnaĵoj, bele presitaj, de lokoj el la junaĝo de la aŭtoro de Esperanto. 22,50 gld.

Disko (granda): Veselin Damjanov kantas en Esperanto. Sofio: Balkanton, 1978. Naŭ tradukitaj kaj tri originalaj kantoj de la profesia bulgara baritono. 18,00 gld.

Flageto: Esperanto internacia lingvo. Triangulo 12x20x20cm. Verda plasto, kun tena ŝnuro. 2,10 gld.

Gluetiketo. 1,5x10cm (eta). La jubilea simbolo kaj la vorto *esperanto* sur blanka fono. 0,09 gld.

Gluetiketo. 3x20cm (granda). La jubilea simbolo kaj la vorto *esperanto* sur blanka fono. 0,90 gld.

Insigno n-ro 8. Verda stelo sur blanka fono; longa pinglo. 1,80 gld.

Insigno n-ro 27. Verda stelo sur blanka mapo de Kubo. 3,00 gld.

Insigno n-ro 28. Orlitera *Kubo* kaj verda stelo sur blua kaj blanka fono. 2,40 gld.

Insigno n-ro 29. "Internacia lingvo Esperanto" kun la stelo sur fono ora (29); ankaŭ arĝenta (29a) aŭ bronza (29b). 3,00 gld.

Insigno n-ro 30. Verda stelo sur blanka terglobo. 2,40 gld.

Insigno n-ro 31. Blanka kaj verda UMEA-simbolo sur ora fono. 2,40 gld.

Insigno n-ro 32. Monda Centro de Esperanto en Bjalistoko (simbolo kaj vortoj). 3,00 gld.

Insignokolekto Sovetunio. Ok diversaj jubileaj insignoj. 18,00 gld.

Kahelo: Bona gloro pli valoras ol oro. Bluo sur blanko. 10x20cm. 9,00 gld.

Kahelo: En abelujon ne blovu. Bluo sur blanko. 10x20cm. 9,00 gld.

Kahelo: Faro farinton rekomendas. Bluo sur blanko. 10x20cm. 9,00 gld.

Kahelo: Kia greno, tia pano. Bluo sur blanko. 10x20cm. 9,00 gld.

Kasedo: Quizas. Zagreb: Lisinski, 1988. Kantoj el la 44-a Internacia Junulara Kongreso. 9,90 gld.

Kongresinsigno Parizo 1914. El la neokazinta 10-a Universala Kongreso. Limigita nombro. 9,00 gld.

Medalo: Centjara Jubileo de Esperanto. Eldonita en Portugalio. Diametro 8cm. Dorsflanka reliefo de Zamenhof. 23,10 gld.

Studkompleto: Esperanto programita (nederlanda versio). Inkluzivas vortaron (Middelkoop), lernolibron kaj kasedon (Hermann Behrmann, trad. Paul Peeraerts). Celita por aŭtodidaktoj. 75,00 gld.

Vidbendo: En Eŭropo ie. Budapeŝto: Hungara Dublad-kaj Video-Kompanio, 1987. VHS, 80-minuta. Klasika post-milita filmo pri bando de orfoj, kiuj serĉas hejmon en ruiniĝinta Eŭropo. 90,00 gld.

Vidbendo: Mefisto. Budapeŝto: Hungara Dublad-kaj Video-Kompanio, 1988. VHS, 140-minuta. Oskar-premiita filmo pri talenta aktoro sub la nazia reĝimo, dublita en Esperanto de hungaraj profesiuloj. 168,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Bulgario:** En la urbo Ŝumen, la kvar Esperanto-kluboj unuiĝis en la societon "Vekiĝo", kiu havas pli ol 230 membrojn. La "vekiĝanoj" okazigas ĉiumonate duonhoran radioelsendon, havas regulan gazet-rubrikon, propran teatran grupon, E-librovendejon sur la ĉefa strato, viglan instruprogramon k.s. En decembro ili aranĝos feston okaze de Zamenhof-tago kaj la Semajno de la Esperanta Libro. Sendu informojn pri via propra agado, leterojn, insignojn, kaj aliajn materialojn al Esperanto-societo "Vekiĝo", P.k. 60, BG-9700 Ŝumen, Bulgario.


● **Hungario:** Pli ol 1200 legantoj de la sindikata ĵurnalo *Népszava* sendis skribajn respondojn al Esperanto-kurso kiu aperis je ses sinsekvaj lun-
doj. La kurso, el la plumo de Oskar Princz, ampleksis ĉirkaŭ 40 tajpitajn paĝojn kaj informis ankaŭ pri la praktika aplikado de la lingvo.

● **Irano:** Esperanto renkontas pli kaj pli da akcepto en oficialaj medioj, kiuj post la revolucio en 1979 havis fortan kontraŭan sintenon al la lingvo. Tiel povis okazi ĉi-jare la unua ekspozicio de Esperantaj libroj, fare de la eldonejo Atai en la kadro de tutlanda librofoiro, kaj kurso en la teherana universitato "Allame Tabatabai".

En Teherano, grupo sub la gvido de s-ro Aref Azari prilaboras grandan Esperanto-persan vortaron surbaze de PIV.

● **Italio:** Torina Esperanto-Centro organizis prezenton en la urba universitato de la vidbendo *Esperanto* de Roman Dobrzyński, al kiu oni invitis lingvo-instruistojn el la mezgradaj kaj superaj lernejoj. Entute 30 ĉeestis kaj ricevis kromajn materialojn pri la nuna disvastiĝo de la lingvo kaj ĝia propedeŭtika valoro por la lernado de aliaj lingvoj. Ĉirkaŭ dudek instruistoj poste sekvis rapidkurson kun ekzameno, kaj oni instigos la plej lertajn partopreni progresigajn kursojn venontjare. La materialoj haveblas de TEC, via Pastrengo 3, 10128 Torino, Italio.

● **Japanio:** La 13-an de majo, grupon de 41 poloj vojaĝantaj per "Esperantotur" renkontis 15 esperantistoj ĉe la haveno Jokohamo. Tiuvespere entute 80 esperantistoj kolektiĝis por kuna vespermanĝo, malgraŭ la nur dutaga averta pri la pola alveno.



● **Norvegio:** Denove haveblas la grandformata broŝuro *Norvegujo*, kiu per 16 informoriĉaj kaj 8 fotoriĉaj paĝoj prezentas ĝisdatan superrigardon de tiu nordia lando. Ricevu senpage de Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousv. 18, N-0572 Oslo 5.

Persone

● **Kamaĉo:** Lige kun siaj studoj pri la finna lingvo, la juna hispana E-verkisto Georgo Kamaĉo intervjuiĝis kelkfoje dum somera restado en Finnlando. Rezultis longaj artikoloj, i.a. pri Esperanto, en du tutlandaj kaj kvin regionaj ĵurnaloj.

● **Megalli:** Sian 60-jariĝon kiel esperantisto festas ĉi-jare d-ro Tadros Megalli, kiu eklernis la lingvon en Egiptio kaj jam aperis en la *Enciklopedio de Esperanto* de 1933. De 1948 li faris pli ol mil prelegojn kadre de diversaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj la Amerikoj. Pro malfortiĝinta vidkapablo li nun serĉas helpant(in)on, prefere vegetaran, kiu pretus kungvidi rektometodajn kursojn kun li en Egiptio dum la vintro. Adreso: Untergrafendorf 18, D-8387 Rossbach, FR Germanio.

● **Perevalov:** La prezidanto de la sovetia MEM-sekcio, Dmitrij Pereva-

● **Sovetunio:** La tutlanda junulara ĵurnalo *Komsomolskaja pravda* levis la demandon de la Stalinaj persekutoj kontraŭ Esperanto sur sia frontpaĝo, la 20-an de aŭgusto 1988. Temas pri tio, ke de strato en la urbo Kazanĵ (Tartara Aŭtonoma Respubliko) oni forprenis la nomon de la Stalina kulturministro, Ĵdanov, kaj redonis la originan nomon – "Esperanto". Kommentis la ĵurnalo: "Tiu tragedio [de la kontraŭ-Esperantaj persekutoj] ankoraŭ atendas sian esploriston." Ĉu ne preparendas rusa eldono de *La danĝera lingvo*?

● **Svislando:** En 1987 la svisa movado restrukturiĝis en federan sistemon, tipan por tutlandaj organizaĵoj en tiu multlingva regiono. Sekve de t.n. "kulturaj semajnfinoj" en la diversaj regionoj, la movado nun planas festi 1989 kiel la "Jaron de Edmond Privat", kulmine ĉe la 1-a Svisa Esperanto-Kongreso en Ĝenevo. Dume, Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds survojas fariĝi "internacia perfektiga altlernejo"; ĝiaj lingvo- kaj fakaj kursoj dum 1987 allogis sepcenton da studemuloj el multaj landoj.

lov, dum dumonata deĵorado en Vjetnamio kiel oficisto de la novaĵ-agentejo APN aktivis tie ankaŭ por Esperanto. Interalie li helpis organizi ekspozicion de E-libroj kadre de la "Ondo de Paco", parolis ĉe pluraj amaskunvenoj, kaj kontribuis al la akiro de ejo por nova klubo en la Kulturplaco de Sovetia-Vjetnamia Amikeco en Hanojo.

● **Wells:** La Universitato de Londono nomis d-ron John Wells Profesoro de Fonetiko ekde la 1-a de oktobro ĉi-jare. La dono de tiu alta posteno rekonas i.a. la kreskantan famon de Wells kiel unu el la pintaj specialistoj pri la prononco de la angla je monda skalo. Lia fakeco speguligas movade en liaj prilingvaj IKU-prelegoj, lia vaste uzata Esperanto-angla vortaro, kaj lia trafa analizo "Kial ne la angla", kiu espereble baldaŭ aperos, laŭmerite, en la UEA-serio *Esperanto-dokumentoj*.

Iom da informoj pri kotizoj kaj membriĝoj

En sia marta kunsido, la Estraro decidis altiĝi la bazan kotizon je 10%. La buĝeto por 1989 estis prezentita al la Komitato dum la UK en Roterdamo surbaze de tiu kalkulo. Tial la nederlanda kotizo en la apuda tabelo, kiu lastfoje ŝanĝiĝis in 1984, altiĝas de 70 al 77 guldenoj por la kategorio Membro-Abonanto. Ŝanĝoj ja okazis en aliaj kotizoj post 1984, ĉar la plimulto esprimiĝas en landaj valutoj. Ni denove rekalkulis ilin surbaze de la nova guldena bazo kaj nunaj kurzoj.

Plejparte la rezulta altiĝo limiĝas al 10%, sed foje la sumo estas pli alta. Aliflanke, la tarifo B, kiu vaste aplikiĝas en malpli transpagipovaj landoj, altiĝas je nur 5%, kio spegulas por UEA la politikon de tutmondiĝo.

Estas tamen plia ŝanĝo kiu ligiĝas al **remembriĝo**. Laŭ la ĝisnuna sistemo, ĉi tiu revuo irus al membroj-abonantoj ankoraŭ en januaro, februaro kaj marto de la venontajaro. Nur ĉe manko de la aprila numero vi konsciiĝus, ke vi ne pagis kotizon por la nova jaro. En 1989 ni aŭtomate ekspedos nur la januaron kaj februaron numerojn al membroj-abonantoj de 1988, sed ne la martan. Por ricevi tiun kaj la postajn, necesas reaboni. Do, se vi povos jam en decembro kaj januaro prizorgi vian membrecon en UEA, vi treege helpos nin. Interalie, tio ebligas pli fruan dissendon de la Jarlibro.

Ni tre konscias, ke al neniuj plaĉas pli altaj kotizoj. Tamen tiuj kotizoj ne nur aĉetas servojn. Ili esence ebligas multe da laboro por la disvastigo de Esperanto kiu ne venas sub la rubriko de unu el la tradiciaj membro-servoj. Tial ni esperas, ke nia membraro ankoraŭ kreskos post la Jubileo. Nur tiel ni kapablos profiti la eblojn kiuj malfermiĝas antaŭ ni.

Ekspedo de la Jarlibro 1988

La 17-an de majo ni ekspedis la Jarlibron, kaj por MG-kategorio la Gvidlibron. Ni elektis en 50 landoj po unu membro, kaj sendis samtempe respondilon, per kiu la ricevanto informu nin pri la alvendo de la Jarlibro. Respondis 34 el 50 membroj, do 68%. El tiuj, 58% atestis pri alveno antaŭla mezo de junio, kaj 8% en la dua parto de junio. Azio kaj Okcident-Eŭropo montriĝis pli respondemaj ol Sudameriko kaj Orient-Eŭropo.

La ĉefa konstato estas, ke tiu maniero ekspedi la Jarlibron, efektive tra Londono, funkcias. Laŭ la promeso en nia respondilo, ekzemplero de *La fenomeno Esperanto* nun iros al tri el vi kiuj kunlaboris en nia enketo: en Kanado, al s-ino Agnes Nii; en Portugalio, al s-ro Américo Esteves de Almeida; kaj en Vjetnamio, al s-ro Bui Văn Minh Hoàng. Gratulon!

Postkongresa Noto

LKK kaj CO jam esprimis siajn dankojn pro kunlaboro en la sukcesigo de la 73-a UK al impona aro de helpantoj, kiuj transprenis taskojn kaj deĵorojn en ties tuta gamo kaj vario. Tamen en la tagoj tuj antaŭ la kongreso aperis en la CO homoj kiuj simple kaj senproteste aliĝis al taĉmento aŭ plenumis urĝan peton. Foje ili apenaŭ sin prezentis. Do, koran dankon ankaŭ al vi, kaj salutojn el la CO.

KOTIZTABELO POR 1989

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/ <i>guldeno</i>	7	17	42	25	13	84
Aŭstralio/dolaro	9	22	55	33	17	110
Aŭstrio/ŝilingo	75	185	465	280	140	930
Belgio/franko	225	560	1400	840	420	2800
Brazilo/ <i>guldeno</i>	7	17	42	25	13	84
Britio/pundo	4	9	22	13	7	44
Bulgario/ <i>guldeno</i>	9	21	52	31	16	104
Ĉeĥoslovakio/krono	45	110	275	165	85	550
Danlando/krono	45	110	265	155	80	530
Finnlando/marko	27	65	165	100	50	330
Francio/franko	40	90	225	135	70	450
FR Germanio/marko	12	29	72	43	22	144
Germana DR/ <i>guldeno</i>	11	27	66	39	20	132
Greklando/draĥmo	550	1350	3400	2050	1030	6800
Hinda Unio/rupio	32	80	200	120	60	400
Hispanio/peseto	550	1380	3450	2070	1040	6900
Hungario/forinto	200	480	1200	720	360	2400
Irlando/pundo	4	8	20	12	6	40
Islando/krono	250	600	1500	900	450	3000
Israelo/ <i>guldeno</i>	10	25	63	38	19	126
Italio/liro	7500	18500	46000	27500	14000	92000
Japanio/eno	960	2400	6000	3600	1800	12000
Jugoslavio/ <i>guldeno</i>	7	17	42	25	13	84
Kanado/dolaro	8	18	45	27	14	90
Korea Resp./ <i>guldeno</i>	10	25	63	38	19	126
Nederlando/ <i>guldeno</i>	13	31	77	48,75*	24,40*	154
Norvegio/krono	40	100	250	150	75	500
Nov-Zelando/dolaro	11	26	65	39	20	130
Pollando/ <i>guldeno</i>	7	17	42	25	13	84
Portugalio/eskudo	530	1320	3300	1980	990	6600
Soveta Unio/ <i>guldeno</i>	10	23	59	36	18	118
Sud-Afriko/ <i>guldeno</i>	12	29	72	43	22	144
Svedio/krono	40	100	250	150	75	500
Svislando/franko	11	27	66	39	20	132
Usono/dolaro	7	16	39	23	12	78
TARIFO A/ <i>guldeno</i>	8	20	50	30	15	100
TARIFO B/ <i>guldeno</i>	7	17	42	25	13	84

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Kuvajto, Malto, Singapuro.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

*inkluzivas la enlandan imposton de 6%.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-K): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-K): Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-K) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas *Kontakto*-n kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

DM: Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj se kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon *Kontakto*.

Oficiala Informilo

NOVA DUMVIVA PATRONO

Hispanio: J. M. González Aboín.

PATRONOJ DE TEJO 1988

Israelo: J. Tilleman. Usono: N. McBurnett.

SOCIETO ZAMENHOF 1988

Finnlando: H. Tuomola. FR Germanio: H. Schindler. Jugoslavio: A. Petrov. Nederlando: R. Bossong, S. Smits. Pollando: K. Mamok. Svedio: K. G. Lennart Lagerkrantz, L. Holmlund. Usono: M. Bigelow.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Kanarioj: M. P. Maynar. Usono: J. Manson, E. Manson, M. R. Massen, M. Murray.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bv. vidi la kolofonon.

Kooperativo "KOLORIT" pretas liveri al ĉiuj klientoj kontraŭ malaltaj prezoj 80-90 cm larĝan kotonan aŭ miksitan maldikan ŝtofon kun ajna antaŭmendita ĝis 5-kolora desegno (inkluzive kun surskriboj en Esperanto) en kvanto ne malpli ol 3 mil metroj. El ĉi tiu ŝtofo oni povas poste kudri ekzemple ĉemizojn, somerĵaketojn, tablo / lito / naztukojn ktp. Informoj ĉe: p.k. 123, Ivanovo-40, USSR 153040.

C. J. Hindle, bibliotekisto en Oksfordo ĝis 1963, iam estis serioza esperantisto. Ia ajn informo aŭ memoro pri lia esperantista vivo estos valora por D-rino M. Boulton, 36 Stockmore Street, Oxford, Anglujo OX4 1JT.

Mi aĉetas la jenajn originalajn romanojn: *Kastelo de Prelongo, Ĉu li?* (1908), *Paŭlo Debenham, Mirinda amo, Nova sento, Lilio, Pro kio?, Blua kardo, Juneco kaj amo.* Osmo Buller, PL 272, SF-90101 Oulu, Finnlando.

Adventistoj de la Sepa Tago bonvolu fari kontakton kun s-ro Edwin de Kock, Poŝtkesto 902-143, Bon

SUBTENANTOJ (minimume \$25): Nederlando: A. Ŭusink-Nagata. Sud-Afriko: Sudafrika Esperanto-Asocio. Svedio: H. Karlsson. Usono: L. Chapman, M. Bigelow. **AMIKOJ** (minimume \$10): Finnlando: A. Kurikka. Israelo: A. Šalamon, C. Löwenkopf, J. Hecht. Usono: D. Haim.

DONACOJ 1988 (gld.)

ĝis la 3-a de septembro

FONDAĴO AFRIKO: FR Germanio: O. Fischer 291,00. Nederlando: G. F. Makink 500,00, W. Th. J. Zeiss 50,00, J. P. Lootsma 15,00. Sumo ĉi-jara 7414,43.

FONDAĴO CANUTO: Italio: La Bologna Grupo 71,25. Sumo ĉi-jara 1084,58.

ĜENERALA KASO: Finnlando: O. Pajula 23,73. Israelo: J. Giladi 25,00. Irano: M. H. Saheb Zamani 2490,18. Japanio: T. Yamada 43,37, H. Watanabe 12,00. Nederlando: E. M. Maasbommel 500,00, Merkurio 300,00. Usono: A. Unterberg 72,00, M. Kennedy 13,48. Diversaj malgrandaj 6,00. Aŭkcio: 2926,00. Sumo ĉi-jara 8308,38.

FONDAĴO TEJO: Germana DR: T. Bendias 17,00. Sumo ĉi-jara 353,96.

ĈINIO: Nederlando: M. H. v. Zadelhoff 100,00. Sumo ĉi-jara 100,00.

ESPERANTO-CENTRO BJALISTOKO: Bahaa Esperanto-Ligo 10000,00. Aŭkcio 120,00. Diversaj malgrandaj 10,84. Sumo ĉi-jara 10833,22.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

Accord, 0009, Respubliko de Sud-Afriko. Li deziras la starigon de Asocio, por kunligi vin, informi interesatojn pri via religio kaj disvastigi la uzon de Esperanto en viaj ekleziaj rondoj.

Nica literatura revuo. Se vi serĉas mankanta(j)n numero(j)n, mendu ilin ĉe ni (prezo: po 3, – DM): Artur E. Iltis, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

Petas vian helpon per bele afrankita bildkarto aŭ letero al ekspozicio por varbi urbanojn al kurso de Esperanto UNOKI Takanori, Akenokita 1837, Ooita, 870-01 Japanio.

La adreso de geedzoj s-ino Zsófia Kóródy kaj s-ro Rezső Baross ŝanĝiĝis. La nova adreso estas: Fürst str. 14, H-2013 Pomáz, Hungario.

Mi planas eldoni lernolibron pri fiziko kaj serĉas kunlaborantojn tutmonde. Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Vieno, Aŭstrio.

Serĉas korespondantojn tra la tuta mondo F. van der Horst, Kamer 1019, Boezemsingel 100, 3034 CA Rotterdam, Nederlando.

Deziras korespondi tutmonde s-ino Jiang Laifeng kaj s-ro Li Guanghui,

p/a Xinxu Supply and Marketing Cooperative, Hua-an County, Fujian Province, Ĉinio.

Presistoj, eldonejoj serĉataj! Nepre kaj urĝe kontaktu por ĝiaj eldonaĵoj: Universala Kultura Servo, Boîte Postale 1663, 101 Antananarivo, Malagasa Respubliko.

Juna nikaragvano deziras korespondi tutmonde pri politiko, filozofio, diverslingva literaturo, kaj kun aliaj inĝenier(student)oj. Luis D. Alvarez G., Apartado Postal 80-1200, Pavas, San José, Kostariko.

UNUAMONDANOJ SERĈATAJ

Multaj okcidentanoj havus eblecon plibonigi sian lingvokonon per korespondo kun iu polo, kies landa movado rapide kaj altnivele progresas. Same pluraj irananoj atendas leteron de okcidenta eŭropano.

Malgranda laboro estas la skribado de unu letero ĉiumonate aŭ ĉiun duan monaton. Granda plezuro ricevi leteron de iu nekonata plumamiko.

Petu de KSM – kontraŭ respondkuponon aŭ francaj poŝtmarkoj – informilon kaj aliĝilon. Kompreneble vi povas peti adresojn de korespondantoj en aliaj landoj.

Koresponda Servo Mondskala
"Les Hortensias 2"

121 bis, Boulevard Napoléon III
F-06200 Nice, Francio

antaŭulo de l' "Stafeto"-serio:

Jaŭto veturas for... kaj veturigas la morton

Deck Dorval

"Mi kore invitas vin al agrabla surmara vojaĝo, enŝipe de mia privata jaŭto 'Marfalko'..."

Ĉu vi kredus ke tia mesaĝo ekmovigas aventuron en kiu komplika krimo estas solvenda? Laŭ la tradicio de la plej bonaj krimromanoj, Deck Dorval rakontas neverŝajnan historion.

Jaŭto veturas for, kaj... veturigas la morton 190 p., 340 bfr./21 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

MALTRAFA TRAFIKO! La libro anoncita sur p. 294 de *Katalogo 1988/89* sub la titolo *Manlibro pri transporto de fluidaĵoj* de J. Manceau, estas tute erare ordigita sub la rubriko "Trafiko". Fakte, ĝi tute ne temas pri trajnoj aŭ kamionoj, sed pri praktika teknologio de cirkulado de fluidaĵoj en tuboj, kaj la libro rilatas ĉefe al kemia industrio. Cetere, temas pri unu el la plej bonaj fakaj libroj verkitaj en Esperanto. La prezo ĝustas: 21,00 gld. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

TREJNI AKTIVULOJN

Por respondeculoj de novaj asocioj, ekzemple en Afriko, la malnovaj asocioj en landoj kie Esperanto jam delonge funkcias, povas esti valoraj "lernejoj" por spertiĝo.

En okcidenta Eŭropo la ebleco inviti afrikanon por longeta periodo (ekz. kelkaj monatoj) estas negranda. Unue, la ŝtatoj avaras pri permesoj. Due, la asocioj ne vere funkcias ĉiutage, en oficejo (kvankam ekzistas esceptoj). Trie, la asocioj ne ĉiam kapablas porti la kostojn de loĝado, manĝado kaj asekuro.

Kvankam multaj asocioj do ne povas gastigi afrikan respondeculon, ni tamen volas esplori ĉu ekzistas iuj kiuj ja povos proponi tion. Ne temu pri turisma vizito: la invitito devus lerni kiel eble plej multe da organizado, kaj krome devus profiti la okazon por plibonigi sian lingvonivelon kaj eĉ sian instrukapablon.

Viajn opiniojn kaj sugestojn volonte atendas:

H. Bakker

Kastelenstraat 231

1082 EG Amsterdam, Nederlando.

Fokuso

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, P.f. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.



COVALEX S.A.

Chemin des Voirambeys
Chalet "Les Cascades"
CH-3974 MOLLENS
Svislando

Serĉas importi rekte el fabrikanta lando:

malmultekostajn ● 3 ½" kaj 5 ¼" DS/DD disketojn "IBM-kongruajn"

● "IBM-kongruajn" komputorojn, portebajn, kun likva-kristala ekrano,
1 aŭ 2 disketlegiloj, ĉiuj naciaj klavaroj, por lernejoj.

Serĉas eksporti kaj traduki en ĉiuj landoj kaj lingvoj:

la propran komputorprogramon pri tajplernado serioze faritan de gefakuloj.

Por ĝia agado "mara agentejo":

serĉas ĉiam, tutmonde kaj ĉiutage ŝip(et/eg)ojn por aĉeti/vendi, lui/luigi okaze de libertempo, laboro ktp... eble ni jam konas la aĉetiston aŭ la vendiston de la ŝipo kiun vi posedas aŭ pri kiu vi revas... kaj plue ni organizas, en Sud-Francio aŭ en la princejo Monako, ĉion pri maraj aferoj: surŝipajn kunvenojn, luigadojn/luadojn surmare aŭ enhavene, subakvigadon, doganajn kaj flagajn formalizaĵojn.

NI KLOPODAS KOMERCI ESPERANTE, NE HEZITU KONTAKTI NIN SKRIBE EN SVISLANDO.

Ni vologas energie labori internacie kaj pro tio, ni havas bankkontojn en Benelukso, Monako, Svislando kaj plue unu komercan kompanion "Jersey (C.I.) Limited Liability Cy (1861-1968)" por solvi la transitajn aferojn.

**Ĉiu-tagaj Vortoj
kun Difinoj
aŭ, Ne-necesaj
neologismoj por
ne-necesaj poetoj,
gekielvifartasuloj
kaj krokodiloj 1987**

Ofsete presita, 30 p., 15 x 21 cm.
Taŭgas por neologismemuloj; por
geedzoj, kiuj reciproke ne scipovas si-
ajn naciajn lingvojn; por homoj, kiuj
volas paroli la Internacian Lingvon
same bone kiel enlandan lingvon, aŭ
pli bone; por esperantistoj, kiuj mal-
ŝatas *mal-vortojn*. Aĉetu la vortareton
ĉe la Libroservo de UEA por 6,60 gld.

Abonu

EL POPOLA ĈINIO

Nun komenciĝas abonvarba kampanjo 1989 por *El Popola Ĉinio*. EPĈ kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj pri la Esperanto-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas nian gazeton dum la kampanjo (de 1988.10.01 ĝis 1989.02.28), ricevos koloran kalendaron 1989 en Esperanto. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EL POPOLA ĈINIO

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din	3000	5400	7500
Nederlando	Gld	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
US\$	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
US\$	6.50	11.00	16.00

**La varbilon kaj senpagan specimenon
Guoji Shudian sendas laŭ peto.**

Nomu la plej legatajn esperantajn revuojn en la mondo. Kompreneble ĉi tiu organo de UEA, kaj EPĈ, kaj...?

Kaj...

JUNA AMIKO

la kvaronjara revuo por lernejoj kaj komencantoj, kiu nun aperas en 4000 ekzempleroj. Kuraĝiga konstato por nia movada renovigo. Abonu ĝin por 1989 tra perantoj en dudeko da landoj, aŭ ĉe UEA (8,40 gld.). Petu specimenon kaj varbilon de Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapeŝto.

Joëlle Rabu kantas en Esperanto

Aŭskultu la
"mirindan
voĉon" de
la kanada
kantistino
je ŝia disko
Passport.
Kun kantoj en
Esperanto,

Passport
Joëlle Rabu

franca kaj
angla lingvoj.
Kun plenaj
tekstoj. Kun la
jubilea kanto
verkita de
Joëlle kaj J.
Douglas Dodd,
"Esperanto".

Disko aŭ kasedo. Mendu en Eŭropo de la Libroservo de UEA: 31,20 gld. El aliaj landoj de Passport Productions, p.k. (Box) 4538, Vancouver, V6B 4A1, Canada. \$15.00 kanada mono.

Senpaga kasedo

**Ĉu vi instruas
Esperanton
al infanoj?**



Se jes, ni sendos al vi, senpage, *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano*, kasedon de 12 konversaciaj kantoj por komencantoj kun teksto. Ankaŭ havebla al ĉiu ajn: senpaga ekzemplero de *La Revuo de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*.

Adreso: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 3876 Belmont Ave., San Diego, California 92116, U.S.A.

"Stafeto"-serio prezentas:

Sub la signo de socia muzo

Antologio de poemoj kaj eseoj

William Auld kaj Stefan Maul (red.)

Pli ol 50 poetoj festis la centjarigon de Esperanto pere de tiu ĉi antologio. Siajn kreivajn esperantajn kapablojn ili uzis: rezultis antologio komprenebla, kvankam poezia, internacie.

Sub la signo de socia muzo 123 p., 425 bfr./24 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Inter pli ol 2 700 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara

fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo..." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. P. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!